BIBLIOTEKO
de
ESPERANTO KLUBO
OSTRAVA I.

ESPERANTO KLUB
KLIMKOVICE-SLEZSKO



89.

KAATJE



Fot. Ferdinand Buyle, Anvers

Dro W. VAN DER BIEST

ESPERANTO
KOLEKTO DE LA REVUO

PAUL SPAAK

KAATJE

Kvarakta teatraĵo

ESPERANTIGITA

DE

Dro W. VAN DER BIEST

Antaŭparolo de ÉMILE VERHAEREN

PARIS
LIBRAIRIE HACHETTE ET Cie
79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, 79,

1911

Droits de traduction et de reproduction réservés.

546925

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 3394
FILIA Nr 14
w Białymstoku

82-2

821.133.1(493)-2

NOTO DE LA TRADUKINTO

Paul Spaak naskiĝis la 5an de Julio 1871 en Bruselo, kie li nun ankoraŭ loĝas kaj praktikas, kiel advokato.

Liaj ĝis nun publikigitaj verkoj estas :

Voyages vers mon pays (Vojaĝoj al mia lando), aro da versoj,
Kaatje,
La Madone (La Sankta Virgulino), duakta teatraĵo en versoj,
La dixième journée (La deka tago), unuakta teatraĵo en versoj.

La plej grandan, plenrajtan sukceson akiris *Kaatje*. Ĝi estis prezentata proksimume centfoje, en dekduo da urboj en Belgujo kaj Holando, en Parizo (*Théâtre des Arts*) kaj en Buenos-Ayres.

Sro Willem Kloos kaj Sro Antoon Moortgat ĝin tradukis en nederlandajn versojn, kaj jen ĝi estas nun esperantigita.

Ĉe la kvindeka prezentado de *Kaatje* en la Brusela *Théâtre du Parc*, la fama poeto Emile Verhaeren faris rimarkindan paroladon pri tiu teatraĵo kaj la nuna stato de la franclingva belga sceneja literaturo. La eminenta parolinto afable permesis al mi traduki lian paroladon : ĝi estos por la esperantigita *Kaatje* la plej bona antaŭparolo.

Antverpeno, Oktobro 1910.

Dro W. Van der Biest.

ANTAŬPAROLO

Mi estas feliĉa, Sinjorinoj kaj Sinjoroj, tial, ke mi povas, parolante al vi pri S^ro Spaak kaj lia teatra verko *Kaatje*, festi la nepran kaj plenrajtan sukceson, kiun nialanda teatraĵo akiris ĉe vi. Oni aljuĝis al mi nur kelke da minutoj por paroli al vi pri nia teatraĵaro, sed mi esperas, ke dum tiuj malmultaj momentoj mi tamen sukcesos sufiĉe montri al vi, kial nun, ĉi tie, en Bruselo, S^ro Spaak triumfas.

Por komenci, ni kune konstatu, ke antaŭ kelkaj jaroj estis certe neverŝajne, preskaŭ neeble, ke belga verko estu prezentata pli, ol kelkajn tre malmultajn vesperojn.

Vi, la geaŭdantoj, tion kontraŭstaris kvazaŭ obstinege. Vi estis plenaj de antaŭjuĝoj, de duboj, de timoj. Vi fidis nek nin, la aŭtorojn, nek vin mem, la juĝantojn. Nur la francaj teatraĵoj allogis vin : ili estis plenumintaj la ekzamenon ĉe la kritikistaro en Parizo, kaj tio estis por vi garantio por aljuĝi al ili, viavice, scenejajn aŭ literaturajn meritojn.

Vi ne kuraĝis havi propran opinion.

Certe vi estis malpravaj, sed vi malpravis modere. Vi havis, kiel argumentojn, la kutimon kaj la ŝajnan saĝon. Ili estas du grandaj fortoj. Vi pensis, preskaŭ prave : La belga teatrarto nur reflektas, per senbrilaj speguletoj, la arton, kiu brilegas aliloke inter spegulegoj kaj torĉoj. Ĝi nin instruas pri nenio, kion ni ne jam konas, pro tio, ke la francaj teatraĵoj lumigas niajn scenejojn. Plie, ne nur la ideoj, la pensoj, la sentoj esprimataj estas la samaj

en Bruselo, kiel en Parizo, sed la maniero, laŭ kiu oni ilin prezentas, la procedo por ilin pripentri kaj plibeligi, estas multe pli viva, lerta, ĉarma kaj delikata tie. Ni ne havas la « manmovon », la « flekseblecon de l' fingroj », la egan lertecon. Niaj humoraĵoj estas pezaj, niaj spritaĵoj senpintaj, niaj neseriozaĵoj klopodplenaj. Ni dancadas per plumbaj piedoj.

Se la hazardo donis al ni iom da bonhumoreco, tuj ni tro atentigas pri ĝi; ĉia modereco malaperas. Anstataŭ ĝin meti, kiel bongustan bagatelon, sur angulon de bretaro, ni elmontras ĝin ĉe la fenestro kontraŭ la strato, kun provincana montremo.

Tamen, se la tirana forlogo de la franca teatrarto estus konduk-inta nin al malpli sensignifaj subjektoj, ol ŝercetoj apud tablo de salono au tableto de buduaro, aŭ malpli ofte reaŭditaj, ol diskutoj kaj disputoj inter geedzoj en burĝaj domoj, se ĝi estus altirinta nin, post *Blanchette* kaj *Les Coups d'Aile*, al la studado de la provincanaj moroj, la mallerteco de nia imitado estus ŝajninta malpli teda.

Sed ni elektas precize la temojn plej eluzitajn el la francaj dramoj : la edzon kaj la edzinon ĉiam malamikajn, la neeviteblan amanton, la malvirtan junulinon, la dotserĉantan aŭ klubamantan filon, la malsincerajn kaj tede ĝentilaĉajn servistojn, la banalan intrigon, la antaŭviditan situacion, la « verkotan scenon ». Ho, tiu verkota sceno (*la scène à faire*), kiun kun maljunula obstino postulis Sarcey, kaj kiun la tuta kritikistaro postulis post li, tiu sceno, kiun oni devis ĉiam verki kaj reverki, kiu ŝajnis la ekzistmotivo de la tuta teatraĵo, kaj kiun oni sentis preparata, per ruzetoj kaj lertegaĵoj proksimiĝanta, foriĝanta, por reveni kaj eksplodi preskaŭ ĉiam kvazaŭ banala petardo! Nu, tiu verkota sceno devas neniam okazi pro tio, ke la aŭtoro klopodas por ĝin fari; ĝi naskiĝas per si mem tial, ke la situacioj ĝin nature alkondukas; kaj tiusence neniu sceno estas « verkota », aŭ ĉiuj estas.

Sinjorinoj kaj Sinjoroj, vi, kiuj estas la publiko, kaj kiujn oni kulpigis esti malmulte akceptemaj, kiam en unu el niaj teatroj oni ludis belgan verkon, vi do ne plene estis malpravaj, ne laŭdante per viaj aplaŭdoj la scenejan prezentadon de unu aŭ alia el niaj malsukcesintaj teatraĵoj. Verdire estas vi, kiuj bone juĝis, kaj tio estas pruvita de la fakto, ke, de kiam vera oraginalaĵo sin montris en nia teatra verkaro, vi nur mallongtempe ĝin malfidis kaj malakceptis, kaj ke nun vi ĝin aklamas. Mi bedaŭras, ke de la apero de *L'Intruse* kaj de *Intérieur* vi ne tuj forigis vian malnovan malfidon, sed vi sukcesigis *Monna Vanna*, vi festis *Pan*, kaj jen, per helpo kvindekfoje ripetita, vi triumfigas *Kaatje*[1].

Tio, kio devis ŝanĝiĝi, por ke nia teatra literaturo valoru, estas ne nur la ekstera formo de la verko, la enscenejigo, la loko de l' agado, la situacio de l' personoj, sed precipe ilia sentaro kaj la interna vivo, kiujn ili obeas.

La unuaj inter ni, kiuj tion komprenis, estis Van Lerberghe kaj Maeterlinck. Iliaj dramoj, plenaj de malkvieto, de premdoloro, de timo, de teruro, mirinde eltoniĝis inter miloj da nuntempaj teatraĵoj. Ili estis la unuaj, kiuj perforte tiris al ni la atenton de la kritikistoj, kaj la strangeco de ilia arto, kiu iris laŭ malsama direkto, aŭ plibone laŭ mala direkto, ol la aliaj, donis la signalon por la renaskiĝoj. Oni neniam estos sufiĉe dankema al ili pro iliaj troigoj. Mezen de la scenejaj malsimpligoj, de la lertaĵoj, de l' kleraj ruzetoj, de l' malgravaj detaloj, ili alportis la simplecon, eĉ la infanecon kaj la nudan sincerecon. La mistero kaj ia nova fataleco ekestris. La personoj havis infanain korojn. Ili agadis per sia nura instinkto, pro profundaj motivoj. La tragedia teruro ree regadis, kiel iam, sur la scenejo, kaj tio, kion oni ne vidis, estis pli grava, ol tio, kio estis montrata. Kaj la silento ludis grandegan rolon. Ĝi estis la centra aktoro, ĉirkaŭ kiu la ceteraj moviĝis, kaj

1. Tro modeste, S^ro^ Verhaeren preterlasas priparoli la sukceson de siaj rimarkindaj dramoj *Philippe II* kaj *Le Cloître* (Noto de l'tradukinto).

ĝi estis jen la morto, jen la malfeliĉeco, jen la krimo. Tiu arto al unuj ŝajnis ridinda, al aliaj admirinda; por ĉiuj ĝi estis mistera kaj nova. Ĝi esplodigis la kolerojn aŭ incitis la entuziasmojn. Unuvorte, ĝi disfrapis la muron de la banaleco. Tial, precipe, ĝi estis necesa.

Aliaj provoj estas faritaj : Camille Lemonnier, Edmond Picard, Georges Eeckhoud, Iwan Gilkin, Henri Maubel, Gustave Van Zype donis al siaj dramoj, el kiuj unuj estas prezentitaj kaj la aliaj libre eldonitaj, karakterizaĵon des pli bonan, ju pli ĝi malsimilas la alilandajn de longe regantajn teatraĵojn.

Ĉiuflanke oni sin liberigadis, kaj la lasta el tiuj verkoj, fiere kaj nepre sendependigitaj de la franca influo, estas tiu admirinda *Sculpteur de masques*, subskribita de nova nomo : Fernand Crommelynck. Tamen neniu el ili sukcesis akiri ĉe la publiko tiom da sukceso, kaj precipe tiom da daŭra sukceso, kiom tiu, kiu incitos viajn aplaŭdojn hodiaŭ vespere. Tio devenas el la fakto, ke neniu enhavas, inter siaj multnombraj kaj admirindaj belaĵoj, kun tiom da facileco aŭ kun tiom da sukceso, la ĉarmon. Kaj ne ian ĉarmon konsistantan el sprita bonhumoreco aŭ facila eleganteco, sed tiun ĉarmon pli profundan kaj nepre nian propran, mi volas diri la ĉarmon de l' intimeco.

Ĉu vi jam pripensis, kiel malofta ĝi estas en la literaturo kaj la arto francaj? Krom Chardin neniu pentristo ĝin konas, de Claude kaj Poussin ĝis Manet kaj Renoir. Tiuj majstroj nur interesiĝas je kunmetado, je desegno, je koloroj, je nuancoj. Ili faras ĉefverkojn, kiuj certe distingiĝas per observado, per forto, per grandiozeco, per kortuŝeco, sed ili neniam en sian laboron metas tiun floron delikatan, kvazaŭ kaŝitan sub la herbaro, al kiu ni tiel fervore dediĉas nin en nia skolo. Ĝi estas jam en la pentraĵoj de la fratoj Van Eyck. Oni ĝin admiras en tiu superbela dominternaĵo konservata en la Londona National Gallery kaj prezentanta Arnolphini kaj lian edzinon. Oni ĝin vidas ĉe Memling, ĉe Gerard David ;

oni ĝin — kun kia emocio! — retrovas en tiu admirinda triptiko, kiu apartenas al la grafo de Mérode, kaj kiu montras al ni Sankt'an Jozefon, la ĉarpentiston, farantan en sia laborejo muskaptiletojn por sia hejma uzado. La sento de l' intimeco estas enhavata en la verkoj de Breughel, de Grimer, de ĉiuj « malgrandaj majstroj » el la XVII[a] jarcento, kaj nuntempe ĝi reaperas, pli belega kaj pli silenta, ol iam, en la pentraĵoj de De Braekeleer.

Kaj en la literaturo, kiom da paĝoj estas plenaj de ĝi! Rememoru la interparoladojn de Claes kaj Uilenspiegel, en la *legendo* de De Coster, la ravajn kaj intimajn priskribojn de la *Vireto de Dio* de Lemonnier, iujn strofojn de Max Elscamp, iujn rakontojn de Delattre, des Ombiaux, Rency, Glesener; pensu precipe al Eugène Demolder, kiu skribis tiel, kiel De Braekeleer pentris.

Jes, la kortuŝa, emocianta, profunda, intima ĉarmo estis efektive tio, kio en *Kaatje* tuj akiris la simpation de l' publiko. Oni sin sentis hejme, aŭ plibone ĉe prapatroj, kiuj estas ni mem en la estinteco. La ĉirkaŭaĵaro estis nia. Oni sin mem retrovis en la fundo de siaj propraj memoraĵoj; unuvorte, oni rekonis sin mem.

Negrave estis, ke la agado okazas en Holando; se ĝi estus malvolviĝinta en Flandro, ĝi estus estinta sama. Ne la loko de la scenaro nin precipe interesas, sed la spirito, kiu regas en la tuta verko. Oni povas elpensi — kiom da fojoj oni tion faris! — intrigojn, kiuj komenciĝas kaj finiĝas meze de la flandra aŭ de la valona lando, kaj kiuj tamen ne allogas nin, tial nur, ke la personoj estas alilokaj. Kvankam vi montros en brusela salono la « ĉefan amanton », la « ĉefan amantinon », la « noblan patron », la guvernistinon, la gravan serviston, la beletan ĉambristineton, via arto estos senefika, se ili parolos, pensos, agos, ŝercos, ridos, ploros same, kiel en la teatraĵoj de l' bulvardaj aŭtoroj. Ne la ekstera prezentado nin interesas; la animon, la psikologion, la vivon ni volas senti aŭtoĥtonaj.

Se iam la teatro devos okupi grandan lokon en nia arto, ho, tio ne estu pro ia supraĵa kaj banala nacieco! Ĉi tio ĝin neevit-

eble malriĉigus kaj rapide sekigus. La loko de la agado kaj la pritraktata subjekto estas negravaj : ĉefaj restas la originaleco de la pensado kaj de la emocio.

Ni devas prezenti la eternajn ĝeneralaĵojn, tion, kio restas trans nia tempo, kio ekzistas trans nia horizonto. La universalaj sentoj, la universalaj ideoj, la universalaj magnetismoj devas altiri nin, antaŭ ĉio.

Kiam Maurice Maeterlinck skribas siajn unuajn dramojn, li pensas al la tuta homa destino, li konstruas sian verkon sur la tomboj, el kiuj, de jarcentoj kaj jarcentoj, estas farita la grundo de la tero surloĝata kaj li montras al ni la premdoloron, la timon, la teruron de la tuta homa estaĵo antaŭ la nekonataĵo kaj la morto. Sed en la maniero, laŭ kiu li tremas kaj timas, oni sentas iun ĉitiean, oni sentas la superstiĉeman kaj naivan Flandranon, oni sentas la infanon edukitan en Gento apud la kanaloj, la beginejoj, la kastelo de l' grafoj kaj la ruinoj de l' abatejo de Sankta Bavono. Oni eĉ kredus, ke la tuta dramo *L'Intruse* okazas en lia domo, en lia kampobieno en Oostacker; kaj tamen nenio estas signita, nenio estas precizigita, kaj, se ĉio tio ĉi okazas en Flandro, ĝi povas ankaŭ okazi ĉe la ekstremaĵo de l' mondo.

Kaj ĉu ne en la admirinda *Pan* de Van Lerberghe okazas la sama miraklo? Ĉu la lukto de la sankta instinkto kontraŭ la sociaj uzadoj, laŭdogmaj, malgrandemaj, solenaj, ne okazas ĉie, kaj ĉu la dramo ne havas altan signifon, kie ajn oni ĝin ludas? Tamen la tipoj, kiujn la poeto imagas por enscenejigi sian penson, estas tiom niaj, ilia komikeco, ilia groteskeco portas tiom la flandran sigelon, ke ĉie, en la tuta mondo, oni tuj komprenos, ke tiu, kiu donis al ili tiun mokindan vivon, naskiĝis en la lando de Jordaens kaj Breughel.

En *Kaatje*, tute nederlanda pentristo, penetrita de sia raso, formita de la riveroj, la tero, la vento, la lumo tieaj, decidas, dudekjare, senigi sin de si mem por serĉi en fama lando fremdan

instruadon kaj, se mi kuraĝas diri, emociojn, pensojn, manojn, okulojn, kiujn li kredas pli bonaj, ol liaj estas.

Li de tie iam revenas, fiera pri si mem kaj pri sia metamorfozo, preskaŭ feliĉa tial, ke li elvojiĝis; sed jen malrapide lia lando lin realmilitas, ĝi lin liberigas de lia nenatura edukado, kaj ĝi redonas al li la feliĉon, per la rideto de junulineto sidanta apud fajrejo, kun simpla puntkuseno sur la genuoj. La ideo estas ĝenerala; ĝi enhavas la lukton de la homa personeco kontraŭ nenatura edukado. Ŝanĝu la situaciojn. Imagu ne nordan, sed sudan artiston; ne flandran, sed italan pejzaĝon; edukadon ne en Hago, sed en Venezio ricevitan; kaj sentigu al iu lerninto de Carpaccio la deziron al Brugo, kiel Jan sentas la deziron al Romo; vi eltiros el la teatraĵo la saman instruon kaj la saman konkludon. Kaatje vivas kaj estas vera, ne nur tie ĉi, sed ankaŭ aliloke, ĉie; kaj jen la precipa merito de la aŭtoro.

Ni ankaŭ diru, ke la teatraĵo venis ĝustatempe. Ĝi estis « en la aero ». Kiom da junaj poetoj sendube bedaŭras, ke ili ne ĝin skribis! Dum la nuna momento, kiam nia literaturo formiĝas, akiras muskolojn, sangon, cerbon, Kaatje al ĝi montras, kiel ĝi devas akiri, konservi kaj ekvilibri sian forton.

Certe, ne estas malpermesite iri malproksimen por entuziasmiĝi pro alilanda arto. Romo kaj Firenzo en la XVI^a^ jarcento, Parizo en la XIX^a^, restas urboj de ega spiritaltigo kaj edukado; sed oni ne estu ensorbata de ili tiom, ke oni el ili revenas kun ia Pomona, tute latina belulino, dum ia humila, sed admirinda Kaatje, kies beleco estas nepre norda, nin atendas kaj nin amas, silente, en nia hejmo. En ŝi ni devas revidi nin mem, post iu ajn vojaĝo. En ŝi ni devas retrovi, ĉiam pli forte, nian profundan intiman vivon.

Kaj nun ni deziru, ke triumfoj kiel tiu de *Kaatje* multobliĝu en nia lando. Mi estas certa, ke la direktoro de ĉi tiu akceptema teatro tion deziras kaj atendas ankaŭ. Lia mano restas etendita

al la « junaj », kaj lia plej bela tasko komenciĝas. Hodiaŭ vespere lia nomo intermiksiĝas, plenrajte, en nia tuta ĝojego.

Kaj ni deziru ankaŭ — kaj mi finas, dirante tiun deziron —, ke la venontaj sukcesoj estu tiel honestaj, tiel puraj, tiel sanaj, tiel liberaj ĉu de paciencaj intrigoj ĉu de senspiriga ĉasaĉo al sukceso, kiel la triumfo hodiaŭa, la plej brilega, kiun nia teatrarto entabeligis.

Émile Verhaeren.

KAATJE

Kaatje estos prezentata dum la Sepa Universala Kongreso de Esperanto (Aŭgusto 1911) en la Reĝa Nederlanda Teatro de Antverpeno.

La direktoroj de tiu teatro, Sroj GUSTAAF DE LATTIN kaj FRANS VAN LAER, konfidis la prezentadon de la esperantigita *Kaatje* al la sama ĉefreĝisoro (Sro Arie Van den Heuvel) kaj la samaj geaktoroj, kiuj havas en sia repertuaro la ofte ludatan nederlandan tradukon, verkitan de Sro MOORTGAT kaj kies nomoj estas :

Sinoj MARIE VERSTRAETE (La Patrino),
HÉLÈNE BERTRIJN (Kaatje),
MAGDA JANSSENS (Pomona);
Soj LOUIS BERTRIJN (Jan),
KAREL VAN RIJN (La Patro).

KAATJE

La jenaj faktoj okazis dum la jaro 1610 proksimume, en la suda parto de Holando. Iliaj geaktoroj estas :

JAN, *dudekjara je la komenco de la teatraĵo, lia patro, lia patrino, lia kuzino* KAATJE, *aĝa je dek-sep jaroj, kaj* POMONA.

UNUA AKTO

Printempa mateno superŝutadas per delikata lumo la urbeton, kies muelejbrakoj turniĝas proksime de Gorkumo, inter la Mozo kaj la Rejno. En la granda kaj hela ĉambro, la patrino de Jan kaj Kaatje, lia kuzino, plenigas per vestaĵoj kaj diversaj objektoj, kuŝantaj sur la tablo, tolan sakon, kuntenatan per rimenoj. Tra la rombaj vitraĵoj de l' fenestroj, kies internaj kovriloj estas disigitaj, kaj tra la pordo malfermita, kondukanta al la perono, vidiĝas la jam verdaj arboj kaj, pli malproksime, la alridetanta kaj plata kamparo kun muelejoj kaj blankaj nuboj, pace preterglitantaj. La sunlumo eniĝas en la ĉambron per oblikvaj radioj kaj distrancas la platŝtonaron en lumajn kvadratojn. Ĝi igas pli milda la ombron, en kiu desegniĝas, maldekstre, la granda kameno kaj la pordo kondukanta al najbara ĉambro. Kontraŭ tiu ĉi kameno estas alia pordo, kaj, samflanke sed poste, staras okŝtupa ŝtupareto kondukanta al alia ĉambro, antaŭ kiu estas mallarĝa plataĵo. La lignaĵoj estas kvazaŭ lakitaj tiel puraj ili estas. Krom sur la tablo superŝarĝita, la ordo estas plena. Radŝpinilo kaj skabelo staras antaŭ la fajrejo kontraŭ la patra seĝego; puntkuseno kuŝas sur la fenestra apogilo. La kupraĵoj kaj la porcelanaĵoj brilas. Kanario kantadas en sia kaĝo. La ĉambro estas komforta; la aero, intima, kvieta kaj sana.

LA PATRINO.

Kaj la vojaĝbotelon?... Ĉe la selon
Ni ĝin alfiksos.

KAATJE.

Nu, patrino, kiam
Li estos en Bruselo?

LA PATRINO.

En Bruselo?
Ho, mi ne scias. Li en Antverpeno
Restados unu tagon.... La veluran
Brustveston priatentu.... Ĉar li volas
Vojire vidi la pentraĵojn de
Frans Floris....

KAATJE.

.... kiu havis tiom da
Lernantoj?

LA PATRINO.

Pli ol cent!

KAATJE.

Ol cent!

LA PATRINO.

Li estis
L' artisto flandra la plej fama!

KAATJE.

Sed
Pro kio tiel malproksimen li
Foriras? Oni povas lerni ja
En Antverpeno....

LA PATRINO.

Ho, li scias pli,
Ol la Antverpenanoj! Plie, li
Certigas, ke, por lerni sian arton
Tutplene, oni devas sian landon
Forlasi, kaj studadi la artaĵojn
De la aliaj landoj....

KAATJE.

Diru, kiam
Li estos majstro?

LA PATRINO.

Je reveno sia.

KAATJE.

Ĉu oni do instruos lin?

LA PATRINO.

Sendube....
Ĉu vi la ŝuojn pakis?

KAATJE.

Jen, patrino.

LA PATRINO.

La lanajn ŝtrumpojn?

KAATJE.

Jen.

LA PATRINO.

La vundŝmirilon?

KAATJE.

Jen ankaŭ.... Sed ĉu estas sendaĝeraj
La vojoj?

LA PATRINO.

Mi esperas!

KAATJE.

Oni devas....

Je tiu ĉi momento la pordo, supre de l' ŝtupareto, estas malfermata. Jan eliras el la ĉambro, haltas sur la plataĵo, kaj, ĝoje vokante Kaatj'on, ĵetas al ŝi vestaĵon.

JAN.

Ekkaptu, Kaatje! Metu en la sakon!

Li refermas la pordon kaj ridante malaperas.

KAATJE.

Li ridas!

LA PATRINO.

Kiom li ĝojegas!

KAATJE.

De
Ok tagoj jam li kantas gaje, kiel
La kanario!

LA PATRINO.

Iomete tio
Kompensas, ve! por ni la malĝojegon
De la disiĝ'! Se lia kariero,
Se la feliĉo lia ne postulus
La jenan forveturon, mi neniam
Pri ĝi konsentus! Kiam li veturis
Al onkla instruado, al Gouda',
Li restis tutproksima; ĝi ne estis
Disiĝo! Sed hodiaŭ lia arto
Definitive logis lin, kaj nun
Foriro lia estas vera, nepra,
Terura! De hodiaŭ komenciĝos,
Kun lia riskoplena vojirado,
Por mi l' atendo daŭra, malĝojega
Kaj ofte sensukcesa, ve! de liaj
Leteroj! Estos ĉiuspecaj timoj,
Demandoj, kiuj nokte doloregas :
Ĉu li ne estas, tie malproksime,
Malsana? Kiu flegas lin? Ĉe li,
Ĉu maldormadas iu? Ĉiutage,
Dum li malproksimiĝas pli kaj pli,
Pliiĝas la malĝojo, kvazaŭ iom
Post iom la patrina koro estus
Ŝirata for!

KAATJE, kortuŝate.

Patrino!

LA PATRINO, daŭrigante sian laboron.

Ĉu vi metis
La du manumojn kaj la puntkolumon?

KAATJE.

Jes.

LA PATRINO.

Kiam li nur estis infaneto
Li jam pentraĉis sur la muroj de
La kuirej'! Mi kriis : Petolulo!
Li diris : Mi desegnas! Tiam mi
Forviŝis la hometojn, ridis kaj
Fieris! Ho, se mi sciinta estus!
Sed kiu tiam kredis, ke forlasos
Nin tiu infaneto dorlotata
— Tro eble —?... Ĉu sufiĉos la rimeno?

KAATJE.

Jes, ĉio kuntenigos.

LA PATRINO.

Kiam via
Patrin', fratino mia, mortis, kaj
Nelonge poste via patro, kiam
Ni prenis vin ĉe nin, ĉu vi memoras
Ke li enviis vin, pro la zorgado
Al vi donata! Estis li okjara!...
La tempo, kiu sekvis estis la
Plej bona! Fratineton Jan ne havis,
Li havis sian orfan kuzineton,
Donacon de l' Ĉiel' al ni senditan,
La malfeliĉulinon, kiu nun
Nin feliĉigas!

KAATJE.

Ho, patrinjo kara,
Ne ploru!

LA PATRINO.

Male, lasu min ploradi!
Mi ja kontraŭbatalas jam de tiom
Da tempo, ke por mi nun estas dolĉe
Konfesi la doloron mian. Sed,

Por ke li povu resti ĝoja, Jan
Ne sciu, ke mi ploris. Tiu larmo
Nur antaŭ vi, ho bona Kaatje, fluis :
Mi ploras, ĉar mi ridas apud li!

KAATJE.

Patrino!

LA PATRINO.

Ĉar mi amas mian filon,
Mi havas ĉiujn virtojn, kiel ĉiujn
Malvirtojn ankaŭ. Mia koro estas
Amema, egoista, — donacema,
Avara, — nur laŭ tio, se li estas
Ĉu en feliĉo, ĉu en malfeliĉo!...

KAATJE, ŝin kisante.

Patrino, ne al mi vi tion diru,
Vi, kiu ĉiam estis tiel bona,
Indulga, karesema, ĉiozorga
Por Kaatje, kiel por la propra ido!

LA PATRINO, liberigante sin.

Li venas jen!

JAN. Li ree eliras el la ĉambro kaj haltas sur la platajo.

Ĉu vi antaŭeniĝas?
Ĉu babilante vi daŭrigas paki?

KAATJE.

Ni preskaŭ estas pretaj.

JAN.

Tuj mi venos!

Li reeniras en la ĉambron.

LA PATRINO.

Mi benas nun la tagon, kiam ni
En nian hejmon vin akceptis! Ni
Pro vi al Jan permesis Italujon
Veturi : ni konservas vin!

KAATJE, revante.

Pro mi li
Foriras....

JAN reaperas.

Li portas malsamajn objektojn : ĉaskornon, besthaŭton, bastonon, kunfaldeblan seĝeton, paron da glitiloj kaj farbujon. Malsuprenirante la ŝtupojn li alparolas sian patrinon kaj Kaatj'on.

Ĉu vi prenis mian grandan
Kolumon?

LA PATRINO.

Jes.

JAN.

La grizan feltĉapelon?

LA PATRINO.

Jes, sed ĝi estas eluzita!

JAN.

Tute
Egale! Ankaŭ la vulpfelajn gantojn?

LA PATRINO.

Jes.

JAN.

Bone. Oni estas eleganta
Nur, kiam oni metis haŭton sur
Manhaŭton sian. Kaj mi volas, ke
La plej nobelaj Romaj patricioj,
Vidante min dum miaj promenadoj,
Sin sentu malriĉegaj kaj mokindaj!

KAATJE, ekridante.

Fieregulo!

JAN.

Tute ne; por vin
Honori tio estos. Oni diros :
La jena Moŝto, pli majesta ol
Cezar', per griza feltĉapel' kovrita,
Gantita per vulpaĵoj, kaj marŝanta

Indege kvazaŭ duk' aŭ princo, estas
La kuzo de l' aminda Kaatje!

LA PATRINO, ridante.

Ho,
Infan'!... Sed kion vi alportas jen?

JAN.

Nur kelkajn necesaĵojn!

LA PATRINO.

Sed...

JAN.

Ĉu ne
Plu estas loko?

LA PATRINO.

Sed ĉi tion vi
Ne prenos!

JAN.

Mian kornon? Kion mi
Vojire faros, se enuos mi?

LA PATRINO.

Kaj tion ĉi?

JAN

Kaprinfelaĵon, dum
La pluv' utilan, farbojn, stablon, seĝon,
Bastonon....

LA PATRINO.

Kaj ĉi tion?

JAN.

La glitilojn
Por transveturi Svisolandon!

LA PATRINO.

Kiel
Mi ĉion tion ĉi sukcesos paki!

JAN.

Mi ilin mane portos!

Al Kaatje, kiu ridas.

Kial ridi?

LA PATRINO.

Jan, ne petolu!

Ŝi prenas la ĉaskornon.

Lasu tion!...

JAN.

Sed...

LA PATRINO.

Vojire, kantu... aŭ al ni vi pensu.

JAN.

Sendube!

Kun granda almovo de amo.

Certe mi al vi pensados!

LA PATRINO, lin kisante.

Ho, kara filo mia! Jam hodiaŭ
Vespere malproksima estos vi!
Ĉe kiuj homoj? Kie?

JAN, serioze.

Kvietiĝu!
Mi nun petolas, sed, post kiam mi
Renkontiĝinta estos kun Kornelis,
Neniu estos pli, ol mi, prudenta!
Jes, nun mi ĝojas, forirante, sed
Vi scias, ke en Italuj' mi volas
Vivadi serioze kaj kuraĝe,
Laboradante kaj vin tri amante....
Ĉu la ĉevalo jam selita estas?

LA PATRINO.

Mi vidos tuj.

Ŝi prenas la sakon, kies rimenoj estas bukformitaj, kaj eliras maldekstren. Jan restas apud Kaatje; li ĝoje rigardas ŝin.

JAN.

Mi estos morgaŭ, Kaatje,
En Antverpen'!

KAATJE.

Foriri vin ĝojigas
Do tiom?

JAN.

Ho, mi estas feliĉega!
Antaŭe, tiu ĉi vojaĝo estis
Nur revo, netrafebla cel'! Kaj nun
Ĝi estas ebla, nepra : mi veturos
Hodiaŭ, baldaŭ, tuj! Mi, kiu ĉiam
Amegis la multecon de l' koloroj,
La malsamecon de la bildoj, nun
Mirindajn landojn traveturos! Ĉiun
Matenon novan, nova estos la pejzaĝo :
Arbaroj, riveregoj, domoj novaj,
Aliaj ebenaĵoj, kaj ĉieloj
Malsamaj! Poste, kiam mi la montojn
Per neĝ' kovritajn estos transirinta,
Kaj kiam estos mi preteririnta
La fonton de la Rejno, kiu jen
Enfluas en la maron, fine iam....

KAATJE.

Nu, iam?

JAN.

Iam — post monato unu,
Mi pensas — post la ĝojoj de la vojo....

KAATJE.

Kaj ĝiaj riskoj!

JAN.

Eble jes, — sed oni
Forgesas ilin! — iam, antaŭ mi
Subite : Italujo!

KAATJE, revante.

Italujo....

JAN.

Vi ne komprenas, kia estas ĝi!
Imagu ĝardenegon riĉan je
Palacoj! Ĉe la blua maro, sub

Ĉielo pura, kiel la mantelo
De l' Virgulin', imagu ebenaĵon
Alridetantan, oranĝarbojn, kiuj
Kliniĝas sub la pezo de la fruktoj,
Kaj urbojn artoplenajn, fierantajn
Pro siaj turoj, siaj kampaniloj!
Imagu akvofalojn elfluantajn
El rokoj, larĝajn vojojn sub arkaĵoj
Grandegaj, monumentojn konstruitajn
Pratempe ... kaj imagu, super ĉio,
La bluon, la senfinan, de l' ĉielo,
Sen nub' alia, ol la fumo de l'
Altega, flamkraĉanta mont' Vesuvo!

KAATJE.

Ho, estu singardema!

JAN.

Vidi la
Fieran Romon, Venezion la
Voluptan! Tiujn luksajn konstruaĵojn
Admiri, kiuj al ĉiel' altiĝas!
Revidi l' estintecan gloron en
La kvazaŭviva gesto de l' statuoj!
Kaj, en preĝejoj aŭ palacoj, plori,
Vidante la pentraĵojn admirindajn,
En kiuj la ravata kor' retrovas
Samtempe ĉiujn belajn revojn kaj
La tutan vivon!

KAATJE, admirante.

Ho!

JAN.

Komparu nun
Kun tiuj superbelegaĵoj la

Pentraĵojn, kiujn nia lando povas
Inspiri, kun nebulo sia densa,
Kun sia ter' ebena, ĉiam, ĉie,
Kun sia horizont' sen ia ĝojo,
Kun sia duonombro, kie la
Koloroj malaperas!... Ĉu imagas
Vi sur preĝeja granda fresko niajn
Embarasatajn vilaĝanojn en
Mokindaj vestoj?

KAATJE.

Jes, vi estas prava...

JAN.

Kaj tamen iuj estas, kiuj volas
Nur la pejzaĵojn de Holand' prezenti,
Pro sia senfantaziec' fieras
Kaj pentras homojn, kiajn oni vidas
En la preĝejo kaj en la trinkejoj!
Plivole, ol pentraĉi muelistojn,
Mi manĝus mian tolon kaj eltrinkus
Oleon mian!... Sed en Italujo
Belega, luma estas ĉio! Mi
Heroojn, diojn pentros : Jupiteron,
Eŭropon....

KAATJE.

Kiu estas Jupitero?

JAN.

Li estas di', li sin aliformigas
En bovoviron, kaj Eŭropo estas
Knabino, kiun amas li kaj rabas.
Tagiĝas ĉe marbord'; en konka trumpo
Tritono blovas; ĝis la brust' en l' akvo
La dio enspiradas la marventon;

Eŭropo, tiel rozkolora, kiel
La rozoj, kiuj ŝin ornamas, krias
Kaj ridas, sin tenante ĉe la kornoj;
Najadoj blondaj ilin sekvas, kaj
Ĉirkaŭe flugas ĉarmaj amdietoj!

KAATJE, admirante.

Ĉu vere? Ĉu pentraĵon tian vi
Sukcesus pentri?

JAN.

Jes!... Ne tuj.... Mi devos
Antaŭe la konsilojn de la majstroj
Aŭskulti, kaj labori multe. Sed
Mi volas studi : dum du jaroj, mi
Ne dek minutojn eĉ forlasos la
Penikojn!

KAATJE.

Ho, du jarojn!

JAN.

Jes.

KAATJE.

Du jarojn
Sen ni, sen nia dom', sen la ĝardeno,
Sen ĉio, kiu horizonto via
Nun estas!

JAN.

Mi ja devas, Kaatje, por
Reveni, kiel majstro!

KAATJE.

Ve! Se vi
Revenos!

JAN.

Nun vi diras malspritaĵon!

KAATJE

Ĉu ĉiuj foririntoj do revenis?

JAN.

Sed kio ja okazus?

KAATJE.

Mi ne scias...
Du jarojn!... Malfeliĉa sorto, homoj
Malbonaj... vi tutsola, malproksima,
Kaj ni ĉi tie, viaj jam maljunaj
Gepatroj....

JAN.

Timulino! Ĉu mi estas
L' unua, kiu forveturas? Miaj
Gepatroj estas sanaj kaj fortikaj;
Vi restas apud ili; ili diris,
Ke vi prizorgos ilin, kaj ke fide
Kaj pacience ili min atendos.
Ĝis nun neniu timis ion, kaj
Jen vi parolas senkuraĝe kaj
Infane pri foriro mia! Kial?
Mi estis bonhumora, senbedaŭra,
Kaj nun vi volas la feliĉon de l'
Forir' de mi forigi!

KAATJE.

Jan, pardonu!
Kuraĝa restu! Estas vere, mi
Malpravis, jes, sed tiel malproksima
Vi estos, ke mi timis kontraŭvole.
Sed nun foriru gaje! Jen, rigardu:
Nun mi ne timas plu, mi ankaŭ ĝojas!

JAN.

Sed... sed vi ploras!

KAATJE.

Ve!

JAN.

Pripensu! Por

Ke mi kapabla estu pentri ion
Alian, ol blazonojn, elpendaĵojn
Kaj ornamaĵojn, por fariĝi majstro,
Mi devas lerni, kiel oni faras
Ĉefverkojn!

KAATJE.

Sed ĉu oni devas por
Talenton havi, tiel malproksimen
Foriri? Kaj ĉu oni tie ĉi...?

JAN.

Ĉi tie! kiam Italuj' ekzistas!
Aŭskultu; ofte vi, antaŭe, min
Malĝoja vidis: estis tial, ke
Mi ĉiam pensis al la Suda lando!
Vi scias, kiom mi la arton amas!
Komprenu, ke, ĉi tie, por pentristo
Malbela kaj mensoga estas ĉio!
Sed tie, kie pentris Rafaelo,
La brila suno ĉion plibeligas,
Eĉ la ruinoj restas grandiozaj;
Ĉirkaŭas, de l' naskig', beleco ĉiun ....
Kaj, en inspir' prenante la penikojn,
Por eternigi mian revon, mi
Imagos, ke mi per la fingroj prenas
Radiojn lumajn! La pentristo, kiu
Ne faras tiun sanktan pilgrimadon,
Artist' ne estas! Heemskerk, Moro, Floris
— La flandra Rafaelo —, kaj, antaŭe,
Jan Swart, Van Orley, ĉiuj iris al
La lando de l'ekzilo kaj de l'arto;
Sed tie ili trovis famon, gloron...
Kaj majstro, kiel ili, mi revenos!

KAATJE.

KSIĄŻNICA PODLASKA im. Łukasza Górnickiego Nr ..... FILIA Nr 14 w Białymstoku

KAATJE.

Ho, Jan!

JAN.

Foriris ĉiuj! Kelkaj, eĉ,
Sen mono, vivis ofte tutajn tagojn
Sen manĝo, devis fari plej humilajn
Metiojn, dormis sur la vojoj, estis
Duone nudaj.... Sed la fido, la espero
Subtenis ilin, l' antaŭsento de
La mondo admirinda, kiun kaŝas
La Alpoj! Alveninte, ili, kvazaŭ
Infanoj, iris en lernejon kaj
Studadis apud majstroj gloraj, kiel
Da Vinci, Rafaelo, Titiano!
Kun zorgo kopiante la tolaĵojn
Kaj freskojn, ili baldaŭ sentis, iom
Post iom, kiel steloj unu post
Alia la mallumon de l' ĉielo
Forigas, ke en ili novaj flamoj
Ekbrulas! Kaj, post du, tri jaroj da
Laboro kaj strečado, ili ree
Al la patrujo iris.... Sed la hela
Memor' de tiuj kelkaj jaroj donis
Al tuta viv' ilia sian lumon!
Kaj Floris — kiu tamen havis ĉiujn
Sukcesojn — diris : La plej granda mia
Feliĉo estis, kiam Miĥael'-
Anĝelo, je Kristnaska tago, dum
Mi ploris pro artĝoj', forŝovis la
Kurtenon de l' Juĝado lasta!

KAATJE, kun ekkrio de admiro.

Jan!

JAN.

Ĉu vi komprenas nun, ke mi deziras
Ekkoni ankaŭ tiun grandan ĝojon,
Kaj, forlasante niajn vulgaraĵojn,
Min bani en la jenan riveregon
De arto kaj de lumo? Mi foriras
Do Italujon, por ke mi esprimu
La sentojn, kiuj nun en mi naskiĝis,
Kaj por reveni fine, grandigite
Per tiu ekziltempo kaj savite
Per tiu bapto!

KAATJE, entuziasme.

Iru, iru! mi
Certigas vin, ke mi sincera estas!
Foriro via estas bela, via
Ekzil' necesa! Mi ne ploras plu!
Antaŭe jam, dum vi parolis pri
Reveno via venka, vi komprenis,
Ke mia kor' infana feliĉiĝas!
Sed nun mi antaŭvidas viajn verkojn,
Mi antaŭsentas la majstrecon vian,
Kaj je la bela tago, kiam ni
Ĉi tie vin revidos, en ĉi tiu
Urbeto, kiun via nom' glorigos,
Ho, estu certa, ke unue mi
Al vi alridos, ke la plej feliĉa,
La plej fiera estos mi!

JAN, tušate.

Ho, Kaatje!

KAATJE.

Foriru senbedaŭre kaj kviete!
Gepatrojn viajn mi konsolos. Sed...
Ĉu vi al ili skribos?

JAN.

Certe, ĉion
Mi skribos! Kiel mi vivadas, kion
Mi faras, kiuj min instruas!

KAATJE.

Ĉu vi
Singarda estos, tre singarda?

JAN.

Certe,
Nenion timu! Estas kvazaŭ mi
La Oceanon devus transveturi
Sur ŝipo konstruita por perei!
Ne estas pli danĝere en Firenzo,
En Romo, en Mantu', en Venezio,
Ol tie ĉi! Mi ĉiutage lernos
Senriske, kaj laboros. Mi eĉ vendos
Pentraĵojn miajn! Per l' unua mono
De mi perlaborita, mi por vi
Aĉetos, Kaatje, perlojn el koralo!

KAATJE.

Ho, vi tro bona estas!... Kaj... ĉu vi
De mi akceptos ankaŭ donaceton?

JAN, ridetante.

Sendube, kion?

KAATJE, ŝanceliĝante kaj al li prezentante medalon.

Prenu... tiun ĉi
Medalon; ĝi vin ŝirmu... sed ne ridu....

JAN, emociate kaj akceptante la medalon.

Mi, ridi? kial?

Li kisas Kaatj'on.

Ĉarma bonulino!

Je tiu ĉi momento la maldekstra pordo estas malfermata, kaj la patro de Jan aperas. Ridetante li rigardas ambaŭ infanojn.

LA PATRO.

Nu! Ĉu vi nun adiaŭdiras jam?

JAN.

Ne, patro, ne ankoraŭ. Mi ŝin kisas
Pro tio, ke ŝi eĉ pli bona, ol
Gracia, estas : en okuloj ŝiaj
Briladas pli da bonkoreco, ol da
Ĉiel'!

LA PATRO, karesante la vangon de Kaatje.

Ĉu vi nur nun ekvidas tion?

JAN.

Ne, nun mi vidas ĝin pli bone!

LA PATRO.

Kaj
De kio tiu eltrovaĵ' devenas?

JAN.

De tio ĉi : ŝi vidis, ke min priokupas
La penso, ke ĉi tie mi vin lasos
Malgajaj, solaj; sed ŝi igis min
Kvieta, certigante min, ke ŝi
Vin amos tiom, kiom mi vin amas!

LA PATRO.

Jen sentoj, kiuj nur por vi ĉi tie
Sekreto estis!... Ĉu vi estas preta?

JAN.

Mi estas preta.

LA PATRO.

La pasporton?

JAN.

Mi
Ĝin havas. Kia literaturaĵo!
Unue oni min priskribas : frunto,
Menton', okuloj, buŝ', oreloj, haroj,

Naz', eksterordinare ordinara,
Laŭ la Skabenoj, ĉio estas; plie,
Ĉar nek leprulo nek pestul' mi estas,
La Urbestraro iri, troti, kuri
Al mi permesas; oni povas eĉ
Li kisas Kaatj'on.
Min kisi : oni ne pro tio mortos!

LA PATRO.

Infano!... Ĉu vi havas la leteron?

JAN.

Jes, patro.

LA PATRO.

Bone. Post alveno via
En Antverpen', tuj iru en la domon
De Isaak Salomo, kaj la leteron
Al li vi donu; li la monon pagos.
Vi danku ree lin en mia nomo.
Ĉu vi komprenis?... Jen patrino via....

La patrino eniris maldekstre. La patro, sin turnante al ŝi kaj penante por ŝajni kvieta :

Nu, panjo, ĉu vi pakis ĉion?

LA PATRINO, emociate.

Jes,
En ordo estas ĉio... fine!

LA PATRO, al Jan.

Nu,
Ne tro malfrue forveturu, filo.

LA PATRINO, al Jan.

Sed ĉu vi ne malsatas?

JAN.

Sufiĉege
Mi manĝis, panjo.

LA PATRO, irinte sur la peronon.

Ho, jen Jakob kun
La ĉevaleto.

Al Jan.

Ĉu vi havas ĉion?
La sakon?

LA PATRINO, al Jan.

Vian monon?

JAN.

Jes...

LA PATRINO, metante lian mantelon sur lian brakon.

Jen via
Mantelo...

LA PATRO, reirante al Jan.

Saltu nun sur la ĉevalon :
La horo sonis.

JAN, tre emociate.

Bone...

LA PATRO, lin altirante al si.

Jan, vi nun
Foriras, ĉar ne estas egoista
La nia am', ĉar ni ne volas, ke
Eĉ unu tag' de via vivo estu
Pro ni malĝoja, ĉar vi estis ĉiam
Bonkora knabo, bona filo, kaj
Ĉar, kiam vi revenos, post du jaroj,
Ĉi tien vi alportos ree tiun
Sinceran kaj honestan koron, kiun
Mi sentas jen sub mia mano.

JAN.

Patro...

LA PATRO.

Konsiloj, kiujn oni donas je
Foriro, estas vortoj neutilaj
Kaj tro malfruaj.... El la memoraĵoj

De viaj infanjaroj ĉerpu forton
Je tagoj de volmalpliiĝo. Filo,
Se iam pri la laŭirota vojo
Vi dubos... rememoru, kiel ni vin
Instruis pri la viv', pripensu, kiel
Dum dudek jaroj nia voĉo vin
Gvidadis.... Tiu voĉo devas nun
Nenion plu al vi konsili.

JAN.

Patro...

LA PATRO, kun granda emocio.

Nun iru. Timu Dion; estu brava;
Memoru, ke ĉi tiu domo estas
La hejmo via, ke nenia amo
Pli granda estas kaj pli plena, ol
La amo, kiu, malgraŭ la daŭrado
De la foresto, malgraŭ la forgeso,
La maldankemo, malgraŭ ĉio, la
Benatan horon de l' revid' atendas!

JAN, lin kisante.

Ho, patro! vi ja scias....

LA PATRO, venkante sian emocion.

Jes, mi scias...
Nun iru....

LA PATRINO, premante sian filon kontraŭ sin.

Kara, kara Jan, ho! lasu
Min ree kisi vin!

JAN, ame kisante Kaatj'on.

Ho, Kaatje!

KAATJE.

Jan!

JAN, subite liberigante sin kaj irante ĝis la pordo.

Ĝis baldaŭ!... Mi revenos!...

LA PATRO, sur la sojlo.

Ĝis revido!

JAN, malaperas, sed oni aŭdas ankoraŭ lian voĉon.

Ĝis la revid'!...

KAATJE, sin turnas al la gepatroj kaj ilin kisas kun granda almovo de amo.

Gepatroj! Mi vin amas!

TIEL FINIĜAS LA UNUA AKTO.

DUA AKTO

Du jarojn kaj duonon post la forveturo de Jan, lia patro kaj lia patrino interparoladas, en ĉi tiu sama ĉambro, je la fino de oktobra posttagmezo. La patrino ŝpinadas, sidante antaŭ la fajrejo, en kiu ŝtipoj flamas; la patro promenadas tra la ĉambro, kaj iras, de tempo al tempo, al la fenestro. La funda pordo estas fermita, sed ĉe la sojlosupro pendas densa girlando da folioj kaj da floroj.

LA PATRINO, subite levante la kapon kaj aŭskultante.

Aŭskultu!...

LA PATRO, haltas; post kiam li aŭskultis.

Estas Jakob : li refermas
La stalon.

LA PATRINO, post silento.

Se li nur ne iris tra la
Herbejoj! Kaatje diris, ke la vojo
Malseka estas kvazaŭ marĉo.

LA PATRO, kiu ree promenadas.

Se el
Dordreĥto forveturis li hodiaŭ
Matene, li ĉi tie devus esti!

LA PATRINO.

Sed ĉu li frue forveturis? Li

Sen dub' hieraŭ estis laca, kaj
Post sia matenmanĝo nur foriris...

LA PATRO.

Jes, sed....

LA PATRINO.

Kompatindulo!

LA PATRO.

Nun li jam
Ĉi tie devus esti! Estas strange!

LA PATRINO, senpacience.

Sed haltu! Ĉu piedoj viaj jukas?

LA PATRO, haltante.

Ĉu li ne skribis, je kioma horo...?

LA PATRINO.

Ne. Eble li renkontis sur la voj'
Amikon : post du jaroj oni tiom da
Novaĵoj havas por rakonti!

LA PATRO.

Mi
Rapidus!... Ĉu vi havas la leteron?

LA PATRINO, ĝin donante.

Jen.

LA PATRO eksidas; releginte ĝin :

Nur malmulte da sciigoj. Ĉu
Vi zorge legis ĝin?

LA PATRINO.

Sendube!

LA PATRO.

Kaj
Ĉu vi ne trovas, ke ĝi estas iom....

LA PATRINO.

Nu?

LA PATRO.

Stranga?

LA PATRINO.

Kiel?

LA PATRO.

Mi ne scias.... Kial
Li skribis : « Al neniu diru, ke
Mi venos.... mi nek feston volas, nek
De mia ĝojo ĉeestantojn.... »? Kvazaŭ
Sin kaŝi estas tio....

LA PATRINO, ridetante.

Ĉu vi revas?

LA PATRO.

Sed....

LA PATRINO.

Kiel la aliaj estas tiu
Letero!

LA PATRO.

Pli mallonga!

LA PATRINO.

Tial, ke
Li venas! Li komprenas ja, ke ni
Bezonas, ke la voĉo lia diru
La aĵojn, kiujn liaj fingroj skribis
Al ni ĝis nun. Cetere, li ne ŝatas
Akceptajn festojn, kaj li mokis tiun
Pentriston, kiu kvazaŭ triumfinto
El Italuj' revenis, kaj de tiam
Nenion pentris plu!.... Ne, ĉio tio
Natura estas!

LA PATRO.

Eble!

Li reekmarŝas.

Kiom ni

Kontentaj estos, kiam li revenos!...

Li haltas.

Aŭskultu!... Ne....

LA PATRINO.

Sed fine haltu, patro!

LA PATRO.

Ho, mi ne, kiel vi, kapablus ŝpini
Kviete, kaj atendi pacience!
Mi amas mian filon! Mi ne estas
Trankvila, kiel vi! Mi havas la
Impreson, kiam mi rigardas vin,
Ke tiu kvietec' lin malfruigas!

LA PATRINO, kviete.

Bonege. Sed ĉi tiuj gestoj kaj
Paroloj ne pli frue lin al ni
Kondukos, kaj, por pensi, kiel mi
Deziras, al reveno lia, mi
Bezonas mian kvietecon kaj
Silenton mian ŝatas.

LA PATRO, boneme.

Malafabla
Mi estas... sed pardonu, ĉar mi estas
Senpacienca!...

LA PATRINO.

Kial? De du jaroj
Ni lin atendas! Kiam li apenaŭ
Pasinta estis sub la korta pordo,
Mi jam eksentis timon, kaj deziris
Revidi lin. Ne, plendi mi ne volis,
Sed de l' disiĝo mia vivo haltis :
Mi estis kvazaŭ en mallumo dum
Ĉi tiuj longaj jaroj; miaj manoj
Senbrue faris ĉiutage sian

Laboron, sed spirito mia flugis
Ĉiumomente al la lum', al li!
Jes, mia korp' vivadis apud vi, sed
Mi estis repreninta mian koron,
Por ke li tute havu ĝin....

LA PATRO.

Patrino!

LA PATRINO.

Kaj tio estas tiel vera, ke
Mi kredas mem post longa forestad'
Al vi reveni!... Ofte mi vin ambaŭ
Kompatis tamen, nian bonan Kaatj'on
Kaj vin.... Mi vidis ja, ke vi suferas, patro!

LA PATRO.

Sendube, sed....

LA PATRINO.

Konfesu! Ofte, kiam
Vi sole promenadis sur la digoj,
Ĉu vi ne la foreston de la gaja
Junul' bedaŭris? Kiam, ripozante
En la seĝeg', vesperon tutan vi
Revadis, dum penadis vane Kaatje
Vin distri, ĉu vi eble kredis, ke
Mi ne komprenas, kian vojon iras
Revado via, ĉiam refarata?

LA PATRO.

Edzino, estas vere. Ambaŭ ni
Lin nedireble amas! Mi ne plu
Min mem rekonas de du jaroj. Ĉiam
La dubo akompanas la foreston :
Ĉar oni nur duone scias, estas
Pligrandigata ĉiu timo; kaj

Pensante al la forestanto, sed
Sciante, ke ŝanĝiĝis li, almenaŭ
Ekstere, mi lin amas, kiel mi
Lin amus, ve! se li mortinta estus!

LA PATRINO.

Silentu! Vi ja scias, ke li ne
Ŝanĝiĝis, kaj, ĉar li revenos tuj,
La filo, la artisto nia, kiel
Kapablas vi paroli pri malgajaj
Aferoj nun!...

LA PATRO.

Ĉar tiu malfruiĝo
Malkvietigas min! Post unu horo
Mallume estos.... Kie estas Kaatje?
Ĉu hejme?

LA PATRINO.

Mi ne scias.

LA PATRO.

Ne, ĉar ni
Ŝin aŭdus.

LA PATRINO.

Certe.

Montrante la fundan pordon.

Ĉu vi vidis ŝiajn
Girlandojn kaj la desegnaĵojn, kiujn
Per sablo ŝi sur nia sojlo faris?
Jam de hieraŭ ŝi kantadas kvazaŭ
Fringeto, kaj senĉese ridas!

LA PATRO.

Ĉu
Vi pensas, ke ŝi lin atendas kun
Alia sento, ol fratino, kiu
Atendas sian fraton?

LA PATRINO, ekridetante.

Jes, mi pensas,
Ĉar ŝi ne ŝatas, ke ŝin oni nomas
Fratino lia.

LA PATRO.

Vi ridetas?

LA PATRINO.

Jes!
Mi pensas ja al io feliĉiga.
Kaj kial ne?

LA PATRO.

Sendube.... Ĉu neniam
Ŝi ion diris?

LA PATRINO.

Ne, neniam. Sed
Mi vidis, ke volonte ŝi parolas
Pri li, ke unu nomon ŝi rediras
Oftege, ke je ĉio, kio lin
Rilatas, ŝi interesiĝas, ke
La tagojn, kiam ni atendas liajn
Leterojn, ŝi l' unua ellitiĝas,
Kaj ke, nevole, senkonscie, ŝi
La vivon lian kaj la sian miksas.

LA PATRO.

Sed li?

LA PATRINO.

Li, li revenos, kiel li
Foriris, nur al sia art' pensante!
Sed kiam li ŝin vidos, tiel belan
Kaj ĉarman, kiam la potenco kaj
La sorĉo de l' ĉeesto ŝia iom
Post iom lin influos, kial li
La amon malproksime serĉus, diru?
Kaj ĉu li estus tiel blinda, ke

Li ne ekvidus tiun amon, kiun
Li mem bezonas, en la koro de
La dolĉa Kaatje?

LA PATRO.

Ho, patrin'! el ĉiuj
Feliĉoj, tiu estus la....

LA PATRINO, streĉante la orelon.

Aŭskultu!...
Mi aŭdas.... Iu venas....

Kaatje gaje eniras tra la funda pordo. Ŝia hararo estas kovrita per delikata kufo; ŝi havas mallongan surveston garnitan per felaĵo.

LA PATRO.

Estas Kaatje!

LA PATRINO.

De kie venas vi?

KAATJE.

De la vojego.

LA PATRO.

Neniu, ĉiam!

KAATJE, rigardante ilian konfuzitan mienon.

Kio estas?

LA PATRO.

Nu,
La jena malfruiĝo nin mirigas;
Patrino estis malkvieta.

KAATJE, ridante.

Kaj
Vi kvietigas ŝin!

Ŝi demetas sian surveston.

Malvarme estas!
Mi iris preskaŭ ĝis Gorkumo, patro!

LA PATRO.

Vi estas rozkolora!

KAATJE.

Jes, ĉar mi
Kontraŭbatalis venton!

LA PATRO.

Kien vi
Marŝadis, Kaatje?

KAATJE.

Nu, al li renkonten!
Sed mallumiĝis; mi revenis. Ho!
La subiĝantan sunon estus vi
Devinta vidi, je la ekstremaĵo
De l' poplale'! La muelejaj brakoj
Ripozis; nevidebla bird' ekkantis
Fiere al la suno, kies disko
Atingis la herbejon.... Tiam, kvazaŭ
Ĝi nur atendis tiun signon, granda
Radio flama purpurigis la
Kanalon. Kaj mi pensis : Estas prave;
Dum brilo-, kanto- kaj feliĉoplena
Vespero, nia Jan revenos hejmen!

LA PATRO.

Sed vi ne vidis lin!

KAATJE.

Ne, mi renkontis
Neniun sur la vojo, kaj mi volis
Reveni antaŭ la noktiĝo. Kion
Vi diras pri la foliaro?

Ŝi montras la girlandojn.

LA PATRINO.

Ĉarme!

LA PATRO, senpacience.

Ho, kiam fine li alvenos! Tiu
Tromalfruiĝo min timigas!

KAATJE.

Sed
Li ne tromalfruiĝas, ĉar li ne
La horon de l' alveno sia diris!

LA PATRO, malkontente.

Li devus tamen esti tie ĉi!
Aŭ li devinta estus nin averti!
Li estas nur infano!

KAATJE, pacigeme.

Kial vi
Malkvietiĝas tiom? La vesperon
De la reveno lia vi ankoraŭ
Danĝerojn timas! Ĉu ni vere havas
La rajton plendi? Li pri sia vivo,
Vojaĝ', laboroj, mil detalojn skribis!
Ni ja sekvadis liajn penojn kaj
Sukcesojn : li sciigis nin pri ĉio!

LA PATRO.

Jes, estas vere!

KAATJE.

Tiel ofte vi
Al ni rakontojn liajn legis, gajajn
Kaj aventurajn!

LA PATRO.

Estas vere!

KAATJE, eksidante sur la genuojn de l' patro.

Lian
Leteron el Milano rememoru
Kaj lian punon al la malafabla
Pentristo! Kaj alvenon lian en
Feraro, kie la mastrino nomis
Lin Duka Moŝto, lin, al kiu la
Antaŭan tagon oni estus preskaŭ

Doninta, sur la voj', almozon! Kaj en
Kremon' li faris, kiel luan pagon,
Portreton de la fil' de sia mastro!
Kaj Romo! Kiel li admiris la
Moizstatuon! Rememoru lian
Viziton al preĝej' de Sankta Petro!
La benon de la papo! Nian timon
Kaj nian ĝojon repripensu, kiam
La sama kuriero nin sciigis,
Ke li malsana estas kaj denove
Resanigita! Kaj renkonton lian
En Romo, kun Jan Breugel, la Flandrano!

LA PATRO, ekridetante.

Sed vi memoras ĉion!

KAATJE.

Kompreneble!
Kaj ankaŭ..., ke ni ridis, kiam li
El Romo skizkajeron sendis, kune
Kun rozario por patrino; mi
Memoras, kiom mia koro ĝojis
Pro la korala ĉirkaŭkolo kaj
La orelringoj! Mi memoras, certe!
Ho, mi kalkulis ĉiutage, kiom
Da tagoj daŭros la atend' ankoraŭ,
Kaj sentis ion iĝi pli malpeza
En mi, ĉar pli kaj pli proksima la
Revid' fariĝas!

LA PATRINO.

Do al li vi pensis?

KAATJE, simple kaj ridetante.

Mi? ĉie, eĉ en la preĝejo. Dum la
Kermeso lasta, la festmarŝ', la balo

Ne interesis min. Ne, danci mi
Ne volis! Rigardante la junulojn
El tie ĉi aŭ el la ĉirkaŭaĵoj,
— Ĉu seriozaj, ĉu ridemaj — ĉu
Trankvilaj, ĉu petolaj — pensis mi :
« Ho, nia bona Jan centoble estas
Pli bela, ol ĉi tiuj! » Kaj vespere,
Je la komenco de la bal', mi volis...

Subite ŝi ĉesas, kaj forlasas la genuojn de l' patro.

Sed kial vi demandas tion ĉi?
Ĝi estas ja natura!

LA PATRO, ame.

Certe, Kaatje,
Ĝi estas tre natura! Kaj vi pravis
Dirante, ke li skribis tiom da
Novaĵoj, ke li estos konservinta
Nenion por rakonti.... Prave ankaŭ
Vi diras, ke li estas la plej bona
El ĉiuj! Sed mi volus tamen, ke li
Rapidu!

Dum tiu ĉi interparolado, iom post iom noktiĝis. La patrino ekbruligis la kupran lampon, kiu staras sur la tablo. La scenejo estas lumigata nur per ĝia flamo kaj per tiu de la fajro.

LA PATRINO.

Jam noktiĝis!

LA PATRO, alproksimiĝinte al la fenestro.

Mallumegaj
La vojoj estas! Kial li nin ne
Avertis!

LA PATRINO, ekplorante.

Ho, li eble elvojiĝis...
Aŭ falis de l' ĉevalo!

KAATJE, kvietige

Tuj li venos.

LA PATRO.

Sed kiam? Mi malkvietiĝas pli
Kaj pli!

LA PATRINO.

Se Jakob kun lanterno irus
Renkonten....

LA PATRO, al Kaatje.

Kiel estas eble, ke
Vi sola tie ĉi kvieta restas?

KAATJE.

Ĉar via timo estas senmotiva.

Ŝi devigas lin reeksidi kaj eksidas apud lin.

Tre ofte oni estas tiel certa
Pri io, ke la nura fido ĝin
Efektivigas. Nu, mi sentas, ke
Li venas, ke li estas tutproksima!
Ne dubu! Antaŭ kelkaj jaroj, dum
Li lernis la latinan lingvon ĉe
La pastro, kiam li revenis je l'
Vespero, mi lin ĉiam pense sekvis
Kaj ĉiam akurate! Tie ĉi
Patrin' sidadis apud la ŝpinrado;
Mi laboradis apud ŝi, revante
Kaj puntfarante, la fadenojn kaj
La pensojn miksadante. Kaj mi diris :
El la pastrej' li iras; li laŭpasas
La muron de l' preĝejo, li transiras
La placon; nun li estas sur la strato;
La pordon de la korto li malfermas;
Li supreniras la ŝtuparon; jen
Li estas!... Same kiel tiam, nun

Mi sentas tiun ĝojan korektremon...
Aŭskultu!...

Febre dirante tiujn ĉi lastajn vortojn, Kaatje ekstaris subite. Oni aŭdas bruon ekstere. La gepatroj ankaŭ ekstaras.

LA PATRINO.

Jan!

KAATJE.

Li!

LA PATRINO.

Jan!

LA PATRO, malfermante la pordon.

Ĉu estas vi,
Jan?

JAN, aperante kaj haltante sur la sojlo.

Estas mi.

LA PATRO, etendante la brakojn al li.

Infano mia!

LA PATRINO, lin kisante.

Kara
Infano, infaneto!

LA PATRO.

Ni atendas
Vin de l' tagiĝo!

LA PATRINO.

Filo mia!

LA PATRO.

Sed
Eniru! Kio estas?

JAN, kiu ne ellokiĝis, forigante siajn gepatrojn per mano, kaj tre emociite :

Patro.... decas...
Mi devas, antaŭ ol eniri, diri
Al vi....

LA PATRO, mirante.

Nu! kio do okazis?

JAN, pene.

Jen.
Pardonon mi unue devas peti, ĉar
Ĝis nun mi silentadis.... Mi ne scias,
Ĉu vi akceptos min; mi timas viajn
Riproĉojn.... Mi ne estas sola... mia
Edzin' ĉi tie estas....

LA PATRO.

Kio! Via
Edzino!

JAN.

Jes.

LA PATRO.

Mi ne komprenas!

JAN, ankoraŭ starante antaŭ la malfermita pordo.

Ho!
Vi ŝin kompatos, patro, kiam vi
Ŝin konos.... Mi ne volas trompi vin...

LA PATRO.

Parolu!

JAN.

Mi ne povas nun rakonti
Okazintaĵojn ĉiujn.... Sed ĉi tion
Vi devas scii : antaŭ tri monatoj,
En Romo pastro geedzigis nin;
Edzino mia estas tie; mi
Al vi kondukas ŝin... Mi scias, patro,
Ke mi malpravis, jes.... Sed mi certigas
Vin, ke ŝi estas inda esti via
Filino kaj kun mi en via hejmo
Vivadi.... Sed, se via volo tia
Ne estas, se vi ne akceptas ŝin....
Nu! bone!... Tial sur la sojl' mi haltas!...

LA PATRINO, plorante.

Jan!

LA PATRO.

Vi! Vi, kiu devis fidi nian
Bonvolon, se vi diras veron, kial
Silenti, kial timi?

JAN.

Patro!...

LA PATRO.

Diru,
Se nun senkulpe vi revenas, kial
Kaŝadi, kiel oni kaŝas pekon?
Parolu!

JAN, daŭrige starante sur la sojlo, petegante.

Patro, ho! severa estu,
Vi rajtas tion.... Sed respondu, mi
Petegas vin.... ĉar ŝi malvarmas....

LA PATRO, post silento.

Ŝi
Eniru!

JAN, sin turnante posten kaj vokante, tre mallaŭte.

Venu.... ĉu malvarmas vi,
Pomona?

Dirante ĉi tiujn vortojn, li ame alproksimiĝis al Pomona, kiu ŝanceliĝante kaj time eniras. Ŝi estas kovrita per mantelo, kiu ŝin tute envolvas; ŝiajn nigrajn harojn ĉirkaŭas skarpo.

POMONA, respondante al Jan, time.

Iom.

JAN, al sia patro.

Ĉu ŝi povas apud
La fajr' eksidi?....

Li kondukas Pomon'on al la fajrejo.

Ĉu vi volas sidi?

POMONA, mallaŭte.

Ne, ne, mi estas bone tiel, stare....

Longa silento. La gepatroj kaj Kaatje rigardis la Italinon, ne farante eĉ unu geston.

JAN, starante apud la tablo, fine ekparolas, tre emociite

Mi diris, patro, ke vi scios ĉion,
Kaj poste vi decidos nian sorton.

Al la patrino kaj Kaatje, kiuj iras al la pordo.

Ho, restu! mi al ŝi nenion kaŝis!

Ŝanceliĝante.

En Rom' mi loĝis en la dom' de ŝiaj
Gepatroj.... Mi kun ili konatiĝis,
Ni kelkafoje interparoladis,
Ni faris servojn unu al alia....

Post paŭzeto.

Mi estis sola!.... La soleco ofte
Malgaja estis; la leteroj miaj
Parolis nur pri miaj gajaj tagoj!
Sed kiel ofte mi bedaŭris, sub
Ĉiel' eterne blua, la nuancojn
De niaj grizaj kampoj! Kiel ofte
Kun emocio mi image vidis
La muelejojn de la Mozaj bordoj!...
Kaj por forigi tiujn pensojn, mi
Eksidis ofte apud tiuj homoj;
Mi preskaŭ ĝojis, kiam mi
Ilian voĉon muzikplenan kaj
Amikan aŭdis....

Montrante Pomon'on.

Tie mi ŝin vidis....
Ŝi estas la plej bela.... Kiam mi
Malgaja estis, ŝi konsolis min,
Eĉ per rigardo nur! Dum mi laboris,
Dum mia revo provis miajn fingrojn
Konduki, ŝi ekstere kantis, kaj
Mi ŝin aŭskultis. Je l' vespero, antaŭ
La malfermita pordo, mi rakontis

Al ŝi la vivon de l' patrujo nia;
Ŝi ne parolis.... sed mi aŭdis ŝian
Animon.... Kaj ni enamiĝis iom
Post iom.... Se vi scius, kiom ŝi
Kaj amo ŝia min subtenis en
La fremda lando! Ŝi min helpis verki,
Amante mian verkon! Al nenio
Preciza ni pensadis, ni nenian
Projekton havis.... Fine, iun tagon,
Mi malsaniĝis, kiel ja vi scias....
Al vi leteroj miaj tion diris,
Sed ion mi ne skribis, ĉar ĝi estis
Nepriskribebla : estas la boneco,
La sindonemo, la dolĉeco, kiujn
Ŝi montris min flegante! Eĉ ne unu
Horeton ŝi forlasis mian ĉambron,
Sen timo de l' danĝer', trovante la
Rimedojn por min resanigi.... Patro,
Patrin', mi vivas, ĉar min savis ŝi!

LA PATRINO, plorante.

Ho, Jan!

JAN,

Kaj tial ĉiutage ni
Nin amis pli kaj pli! Ĉar oni dirus,
Ke ĉiu amindaĵo semas iom
Da amo en la koron; tiu amo
Enradikiĝas, pligrandiĝas kaj
Kunligas fine ambaŭ korojn, kiel
Kuniĝas floroj kaj folioj de
Du glicinioj....

LA PATRO, severe

Jes, sed kial vi
Silentis?

JAN.

Ho, vi pravas, patro, sed
Aŭskultu. Kiam resaniĝis mi,
Mi devis ankaŭ forveturi, hejmen
Reiri... Plej malfrue dum Septembro
Mi devis Romon lasi.... Kaj reveni
Sen ŝi mi ne kapablis. Nia amo,
Cetere, tiom nin kuntenis, ke ni
Jam estis gefianĉoj.... Patro, jen
Kulp' mia komenciĝas! Skribi? kiel
Al vi klarigi ĉion? Eble vi, post
Monato da atend', al ni respondos
Malakceptante.... Kaj mi sentis, ke, se
Vi diros « ne », mi ne reiros plu
Ĉi tien!

LA PATRINO

Jan!

LA PATRO, kun entenata kolero.

Kaj tiom vi deziris
Revidi nin, ke vi forĵetis ĉian
Respekton, ĉian devosenton! Brave!
Ho, niaj filoj bone progresadas!
Edziĝu ni, kaj poste ni ekscios,
Ĉu patro, la maljuna malspritulo,
Kontenta estas! Kaj ni vidos, kian
Mienon havos li, aŭdante, ke
Nun tro malfrue estas por rifuzi!
Se li ne donos sian benon, al la
Diablo ni lin sendos!... Ho, antaŭe
La patro estis la familiestro;
Neniu mokis lin; obei estis
L'unua devo! Li fariĝis nun

Knabeto; li obeas; — kaj la filo
Nun estas ĉef' : li fianĉiĝas, li
Edziĝas.... Peti la konsenton de
La patro? Ne necese!... Skribi? Ho,
La kurieroj estas malrapidaj,
La patro loĝas tiel malproksime!
Edziĝu ni antaŭe!... Brave! Brave!

JAN.

Ho, patro!...

LA PATRO.

Kaj, dum li nin trompis, ni
Atendis lin, kantante lian laŭdon!
Ni tri konfidis lin kaj lian amon
Sinceran, ni lin dankis eĉ pro liaj
Leteroj, kiuj lian tutan vivon
Klarigas... Kaj.... kaj dume, li edziĝis!
Kun kiu?... Mia malspriteco ne
Senlima estas! Kio estas vera
En la rakonto via, ornamita
Sen dub' per kelke da mensogoj lertaj?

JAN.

Ho, patro!...

LA PATRO.

Ĉu mi scias, mi, de kie
Vi venas? Ĉu mi konas viajn Romajn
Amikojn? Ne; vi diris : Mia patro
Nenion scias; des pli bone! Hejmen
Reiru ni! De kie ni foriris?
Negrave! Kian bofilinon mi
Al li kondukas? Nu, negrave ankaŭ!
Sed estas ni! Jen ni! Malfermu la
Pordegon! Kaj, se iu ne kontenta

Sin diras, li nur estas frenezulo!...
Per Dio! kion vi imagis, knabo?

JAN, tremante.

Mi pensis, ke, montrante mian koron
Al vi sincere, mi akcepton trovos
Pli bonan, kaj ke nia aventuro
Natura tiel estis, ke ĝi indas
Pardonon.... Plie, mi konfidis ŝin!
Mi pensis : Mi malbone agis, jes,
Sed kiam ili ŝin ekkonos, kiam
Petegos ilin tiuj belaj nigraj
Okuloj, kiam ili scios, kiel
Ŝi estas bona, kiel ŝi min igas
Feliĉa, ke redonis ŝi al mi
La vivon, ĉu kapablus ili tamen
Rifuzi la pardonon?...

LA PATRINO, tamen ne kuraĝante iri al li.

Kara Jan,
Ne ploru!... Patro, ĉu...?

LA PATRO, kolere.

Silentu! Mi,
Mi estas tie ĉi la ĉefo! Ve,
Li ploras! Ĉu ni scias tion, kion
Li kaŝas, dum li ploras?... Sed pro kio
Li plendas? Li nur faros sian volon!
Ho, la Italoj bone lin instruis!
De ni li volas... kion? Li ĝin diris :
Li nur revenos, se edzino lia
Eniri povos, kiel li! Se ni
Ne volos, li foriros, forlasante
Gepatrojn siajn; pro ameto li
Forgesos nian dudekjaran amon;

Kaj, kiam oni krios « For! » al li,
Anstataŭ alrideti kaj kar....

Dum la lastaj vortoj, kiujn la patro diras kolerege, Jan malespere reprenis la mantelon kaj la ĉapelon, kiujn li estis metinta sur la tablon, li faris signon al Pomona, kaj ambaŭ iras al la funda pordo. La patrino kaj Kaatje, teruritaj, ne kuraĝas fari geston. Subite la patro ekvidas la movon de l' gejunuloj. Li tuj interrompas siajn ripročojn. Li turnas sin al Jan, mallaŭte, kun emocio malfacile kaŝata.

Kien
Vi iras?... Mi ne diris, ke vi devas
Foriri!...

LA PATRINO, petegante.

Patro...

LA PATRO, malrapide, premegate.

Restu tie ĉi,
Vi ambaŭ... Ĉu vi kredas, ke mi ne
Sufiĉe amas vin, por vin pardoni!...

JAN, kun granda almovo de danko.

Ho, patro.... Jes, vi vidos!... Kion diri?...

Montrante Pomon'on al la patro.

Ŝi estas bona, tiel bona!

Al Pomona.

Ĉu vi
Komprenis, ke li nin pardonas? Ĉar
Vi nin pardonas!... Aŭ plibone, ne!
Pardonon vian lasu nin indiĝi.
Ĝi estos ja pli dolĉa, kiam vi
Ĝin donos pro justeco pli, ol pro
Kompato!... Panjo! Ho, ŝi estas inda
Je via koro, kredu min!

Al Pomona.

Kaj vi,
Ĉu ne, vi ne plu timas, ĉar vi vidas
Nun, kiom ili ankaŭ amas min?

POMONA, time.

Jes....

JAN.

Kaj vi amos ilin tial, ke vi
Min amas?

POMONA.

Jes...

JAN, febre plorante pro ĝojo kaj emocio.

Ho, se vi scius, kiom
Da emoci', sed kiom da feliĉo,
Gepatroj!

LA PATRO.

Kvietiĝu, jen sufiĉe
Da ploroj!

JAN.

Tiu tim', malfeliĉigi
Vin, turmentplena igis finon de l'
Vojaĝo!

Montrante Pomon'on.

Ŝi — kunkulpulino mia
Kaj mia senkulpigo — ankaŭ
Suferis. Kaj, ju pli mi proksimiĝis
Al mia revidota hejm', des pli
Malĝojo mia iĝis akra, ĉar
Ĉi tie la senpaciencan ĝojon
Mi sentis, kiu je reveno mia
Forflugos! Ni centfoje haltis sur
La voj'; ni ne interparolis — ni ne
Kuraĝis —; niaj koroj ne plu batis....
Kaj ĵus, je la noktiĝo, kiam mi
De malproksime tiun lumon montris
Al ŝi, ŝi de l' ĉevalo saltis kaj
Ekpreĝis!... Kia tago!... Nun ŝi devas
Ripozi....

LA PATRINO.

Sed... sed vi! Vi febras!...

JAN.

Mi
Ne tiel frue vin forlasos!...

LA PATRINO.

Ĉu
Vi manĝis?

JAN.

Eĉ ne panereton, panjo....

LA PATRINO.

Kompatindul'! Sen dub' vi malsategas!
Ni iru tien; ni pli bone estos,
Pli varme.... Venu!

La patrino malfermas la maldekstran pordon; Jan faras signon al Pomona, ke ŝi devas sekvi ŝin; poste li ankaŭ eliras, antaŭirante sian patron. Tiu ĉi, alveninte sur la sojlo, sin turnas al Kaatje, kiu dum tiu tuta sceno restadis senmova, silenta konsternegita, en angulo de la ĉambro, dekstre

LA PATRO.

Ĉu vi venas, Kaatje?...

KAATJE, pene.

Mi venos tuj....

La patro forlasas la ĉambron. Kaatje faras kelkajn paŝojn; poste, alveninte apud la tablo, ŝi falas en seĝon kaj ploras, apogante la kapon sur la brakon.

Ho Dio, Dio, Dio!

TIEL FINIĜAS LA DUA AKTO.

TRIA AKTO

Proksimume kvar monatoj forflugis de la tago, kiam Jan revenis el Italujo. En la granda ĉambro, pli bela pro la blankeco de la neĝo kovranta la kamparon, dum februara posttagmezo, la patrino okupas sin per diversaj laboroj. Kaatje, sidante apud la fajrejo, ageme faras puntaĵon. Pomona, starante apud la fenestro, rigardas, revante, la falantajn neĝerojn. La silento estas paca, sed peza. Subite Jan aperas sur la sojlo de sia laborejo, supre de l' ŝtupareto. Li ĵus interrompis sian pentradon kaj malsupreniras, tenante sian paletron en la mano; poste, li vokas mallaŭte Pomon'on, kiu staras dorse al li.

JAN.

Pomona! Kion jen vi faras?

POMONA, ne farante movon.

Mi
Rigardas la falantan neĝon....

JAN, alproksimiĝinte al la fenestro kaj ankaŭ rigardante.

Kiam
Mi levas la okulojn, ŝajnas, ke
Mi supreniĝas, mi malplipeziĝas,
Dum la neĝeroj kovras ĉion per
Mantelo blanka, kies interaĵoj
La kanalar' glaciiĝinta estas.
Pejzaĝo rava!

KAATJE, turnante la okulojn al la fenestro.

Rava, certe!

POMONA, restante senmova.

Ne!
Ĝi estas malbelega!

JAN.

Kiel?

POMONA.

Certe,
Ĝi estas malĝojiga kaj malvarma!...
Ho, mia blua maro, miaj montoj
Violkoloraj! Miaj grandaj rokoj,
Sur kiuj ripozadas la lacertoj!
Kaj miaj olivarboj, sin banantaj
En la sunvarmo!

JAN.

Jes, sed tio ĉi
Rigardon indas ankaŭ! La silento
Glacia de la babilemaj fontoj
Haltigis — oni dirus — ĉiujn movojn
De la objektoj. La branĉar' de l' arboj,
La muelejaj brakoj estas, kiel
Marmor', malvarmaj, blankaj kaj senmovaj;
Pli delikataj estas la nuancoj;
La formoj plimildiĝas; ripozadas
La mondo; nur la glaciprismoj, kiuj
Ornamas ĉion, iomete tremas.

Al Pomona.

Somer' senfina via tro samtona
Fariĝas; tie ĉi, dum unu jaro
Kvarfoje ĉio renoviĝas; tiu
Malvarmo....

POMONA.

Estas tombo!

JAN.

Tiu paco....

POMONA.

La morto!

JAN.

Vi ne estas gaja!

POMONA.

Kial
Mi ridus! Ve! En la animo frostas
Kaj sur la koron neĝas! Jam de tri
Monatoj eĉ ne unu fojon la
Ĉielo estis blua! Se almenaŭ
La vento unu tagon la nebulon
Forblovus, kaj la iluzion donus
De kiso de l' printempo! Sed nur estas
La neĝo, aŭ la pluv', sekvataj de
La neĝo ree kaj de l' pluv' denove....
Kaj oni enuegas!....

JAN.

Kiam oni
Nenion faras, jes, sed kiam oni
Laboras, ne!

POMONA.

Labori? Kion fari?

JAN, montrante al ŝi, ridetante, grandan ŝirajon en ŝia jupo.

Ekzemple, fliki vian jupon!

POMONA.

Bela
Okupo!

JAN.

Faru punton.

POMONA.

Infanaĵo!

JAN.

Ne, ne! Rigardu Kaatj'on; ŝi neniam
Enuas.

POMONA.

Kaatje estas ja perfekta!

JAN, pacigeme.

Kaj oni malĝojiĝas, kiam oni
Revadas ĉiam; kredu min...

LA PATRINO.

Li pravas,
Filino. Ni laboras, tie ĉi,
Kaj tial, eĉ dum neĝo, pluv' aŭ vento,
Ni estas ĉiam bonhumoraj.

Ekridetante.

Ĉu
En Italujo oni ne laboras? Mi
Supozas tamen, ke kelkfoje oni
Deziras manĝi, tie?

POMONA.

Sinjorino,
Malmulte oni manĝas. Tiel bela,
Ĝojiga, brila estas la vetero,
Ke oni nutrus sin per sunradio!

LA PATRINO.

Mirinde! Sed ĉi tie ni deziras
Alian nutron; se ni ne laboras,
Ni ne sukcesas anstataŭi la
Panbulon, kiun ni hieraŭ manĝis!

JAN.

En Romo vi ne tiom revis! Ree
Fariĝu energia! De ok tagoj
Vi ne eniris mian laborejon!

POMONA.

Mi iris certe!...

JAN.

Vi ne vidis mian
Pentraĵon lastan...

POMONA.

Kial mi ĝin vidus?

JAN, embarasate.

Antaŭe tamen vi interesiĝis
Je la laboro mia; mi tre ŝatis
Konsilojn viajn...

POMONA, akre.

Vi nenion bonan
Nun faras plu!

JAN.

Vi estas tre afabla!

POMONA.

Sed estas vere! Jes, mi vidis vian
Pentraĵon!

JAN.

Nu?

POMONA.

Ĝi estas nula, nula!
En tiu « Difesteno » oni trovas
Nenion dian!...

KAATJE, protestante.

Kiel estas eble!
Mi pensas, ke belega estos la
Pentraĵo, male!

LA PATRINO.

Jes, belega, certe!

POMONA, ridetante.

Mi do silentos.

JAN.

Ne!... Sed mia verko,
De kiam vi ĝin vidis, ja ŝanĝiĝis!...

POMONA.

Vi petas, ke sincere mi parolu?
Mi trovas, ke ĝi estas kunmetita
Malbone, ke ne vivas viaj dioj,

Ke via Jupiter', l'Olimpa reĝo,
Nur maljunulo estas, ke vi donas
Al viaj korpoj grizan plumbkoloron;
Sen ia arto...

JAN.

Tamen...

POMONA.

Rememoru
Hebeon de Bronzino, tiun brilon
De la vizaĝo, tiun koloraron!
Jen arto!

JAN, malĝoje.

Vi senkuraĝigas min!

POMONA.

Forviŝu tion!

KAATJE, indignate.

Ne, ho ne! Ĝi estas
Tre bela!

POMONA.

Por ĉi tiu lando, jes!
Tre bela, jes, por tiuj, kiuj ion
Alian ne ankoraŭ vidis!

LA PATRINO, al Pomona.

Tiel
Severa estas vi!

JAN.

Jes, estas vere!
Vi ĉiam pri la famkonataj verkoj
Parolas de Guido, de Bronzino,
De Rafaelo! Por akiri la
Majstrecon, ili tamen multajn jarojn
Laboris!

POMONA, ironie.

Rafaelo estis, kiam
Li mortis, tridekjara!...

KAATJE, al Jan.

Ĉiam restu
Kuraĝa!

LA PATRINO, lin kuraĝigante ankaŭ.

Ni konfidas vin!

Dirinte ĉi tiujn vortojn, ŝi forlasas la ĉambron.

POMONA.

Mi ankaŭ!...
Mi montras liajn malbonaĵojn nur
Al li, kaj estas ĉio...

JAN, post silento, reirante al ŝi.

Apud vin
Mi venis por demandi, ĉu vi ne
Deziras ion fari? Supreniri?

POMONA.

Nun ne.

JAN.

Se vi preferas, ni eliros?

POMONA.

Ĉu vi frenezas?

JAN, ridetante.

Oni varme sin
Envolvas, kaj kuradas, tra la vento,
Antaŭen, ĉiam, ne serĉante vojojn;
Vi vidos, ni ĝojegos!

POMONA.

Ne, mi dankas;
Tro frostas.

JAN.

Mi instruos vin glitkuri
Sur la herbejoj!...

POMONA, senpacience.

Lasu min, mi petas!

JAN.

Sed vin malgaja vidi min doloras!

POMONA.

Nu, supreniru ree.

JAN, malgaje.

Mi nenion
Malbonan al vi faris tamen!

POMONA.

Ne...

Jan reprenas sian paletron kaj reeniras malgaje sian laborejon; Kaatje denove ekfaras punton.

POMONA, rigardinte Kaatjon, kvazaŭ indiferente.

Dum la pasintaj vintroj, kiam vi
Infanoj estis, ĉu vi ofte kune
Glitkuris?

KAATJE, simple.

Ofte.

POMONA.

Tio estas ludo
De geamantoj!

KAATJE.

Ho, ĝi estas ludo
De nia land'; ĉu vi ne havas viajn?

POMONA.

Sendube, sed en Italuj' la ludoj
De geamantoj estas io, kio
Tremigas... Kiam viro tie ĉi
Virinon kisas, li nescias, ŝajne,
Al kiu grado de kolero kaj de
Malam' la vera am' konduki povas...
Disputoj, tie ĉi, finiĝas post
Moment'! En mia lando, oni havas
Ponardon, kaj ĝin uzas! Tie ĉi
La viro estas tro cedema, la
Virin' tro malkuraĝa!

KAATJE, mirante pro tiu vivegeco.

Kial tion
Vi diras?

POMONA.

Ho, nenial! Mi nur miras
Pro ĉio nova, kion tie ĉi
Mi vidas! Kiel stranga lando!

KAATJE.

Kial?

POMONA.

Ĝi tiom diferencas de la mia!
Ĝi estas ĝia malo! Ĉi tica
Gajec' al mi malgaja ŝajnas. Vi
Nur komercistoj estas; ni, artistoj!
Ni volas helon kaj aeron; vi
Vin kaŝas en mallumaj domoj!
Malelegantaj estas tie ĉi
La viroj, kaj malbelaj la virinoj!
— Okulojn porcelanajn ili havas! —
En Italujo ĉiu viro kiel
Sinjor' aspektas, markizino ĉiu
Virino ŝajnas! Vi parolas gorĝe
Kaj malrapide, ni, ni kvazaŭ kantas!

Moke ridetante.

Kaj estas diferenco eĉ en la
Manĝaĵoj: vi haringojn manĝas, ni
Oranĝojn!

KAATJE, kviete.

Jes, sed kial vi ĉi tien
Do venis?

POMONA, malĝoje.

Ĉu mi antaŭvidis? Ĉu
Mi sciis, kiam mi foriris, kie
La ekstremaĵ' de mia vojo estos?
Ho, estis la forira febro! Mi
Al io nekonata iris, do

Al io alloganta; kaj mi pensis :
Mi ĉion, ĉiujn, eĉ min mem forgesu
Kaj iru ien ajn, kun la amato!
Forlasi mian familion, Romon,
Transiri montojn, riveregojn, stepojn,
Arbarojn, ho, negrave! La vojaĝo
Nur estos unu longa kiso! Sed
Ve! la ĝojiga rev' nun estas for,
La aventur' finita estas, kaj
Mi estas alveninta! Jen!

KAATJE.

Mi ne
Komprenas vin.

POMONA.

Pro tio mia koro
Malĝojas, ke neniu min komprenas.
Hodiaŭ, elirante el preĝejo,
Mi vidis sur la placo, apud ĉaro
De komercaĵoj plena, homojn, kiuj
En tendo sidis. Dum mi preterpasis,
Subite mi kantantajn voĉojn aŭdis!
Ho, tiu voĉoson'!... Mi haltis.... Estis
Vendistoj vojaĝantaj el Firenzo.
Kun miro ili alparolis min
Kaj premis miajn manojn. Mi, premante
Iliajn ankaŭ, dolĉe ploris, ĉar
« Signora » ili nomis min... En tiuj
Beletaj tri silaboj, mia koro
Retrovis sian tutan Italujon!

KAATJE, tuŝate.

Mi vin kompatas!

POMONA, subite.

Ne kompatu min!
Jan baldaŭ vidos, ke ne estas eble
Ĉi tie pentri....

KAATJE.

Kiel?

POMONA.

Li ne pentras,
Li nur pentraĉas! Sed li sentas, ke
Al li ĉi tie mankas la ekzemploj
De niaj majstroj. Tial malkvieta
Li estas. Kaj, cetere, li komprenos,
Ke mian lumon, mian Romon mi
Bezonas, kaj post kelke da semajnoj
Ni kune forveturos!

KAATJE.

Vi foriros?

POMONA.

Sen dub'!

KAATJE.

Kun Jan?

POMONA.

Kun li!

KAATJE.

Kaj por longtempe?

POMONA.

Por ĉiam!

KAATJE.

Ho, Jan ne sensenta estas!
Mi konas lin : li havas bonan koron!
Li restos tie ĉi!

POMONA.

Por kiu?

KAATJE.

Por
Gepatroj siaj!

POMONA.

Mi lin fidas, kiom
Min mem! Ni iros kune!

KAATJE.

Malgraŭ liaj
Gepatroj, kiujn li amegas?

POMONA, malboneme.

Malgraŭ, eĉ,
La amo plej sindona kaj fratina,
Portante lerte sian maskon, sed....

KAATJE, indignate.

Ho! kion vi jen diras?

POMONA.

Tion, kion
Mi pensas! Ofte vi glitkuris kune,
Ĉu ne, dum viaj infanjaroj?

KAATJE, kun plej granda indigno.

Kial
Vi min ofendas? Tio estas honto...
Jes, honto!... Jan, aŭskultu....

Je ĉi tiu momento, efektive, Jan, aŭdinte la bruon de la interparolado, malfermas la pordon de sia pentrejo; li malsupreniras la ŝtupojn.

JAN, mirante.

Kaatje, kio
Okazis? Kion volas vi?

KAATJE, haltas, subite komprenante tion, kion ŝi estas faronta.

Nenion!....
Nenion!...

Ŝi rapide eliras maldekstren. Jan, miregante, sin turnas al Pomona.

JAN.

Kio estas?

POMONA.

Mi ne scias.

JAN.

Sed....

POMONA.

Mi kritikis ŝian punton. Ŝi
Infano estas!

JAN.

Jes, ŝi estas bona
Infan'; kun ŝi vi ankaŭ estu bona!

POMONA, kolere.

Admiro via estas stranga! Nula
Ŝi estas kaj malsprita; ŝia punto,
Labor' por vulgaruloj!

JAN.

Ho, Pomona!

POMONA.

Ŝi tedas min, mi ŝin malamas, kaj
Mi volas forveturi!

JAN, miregante.

Forveturi?

POMONA.

Jes!

JAN.

Kiel? Kien?

POMONA.

Tien! Romon! Hejmen!

Mallaŭte.

De tri monatoj mi ĉi tie estas,
Kaj tiuj tri monatoj estis longa,
Senĉesa turmentad' por mi! Mi provis
Alkutimiĝi al la dom', al la
Naturo, al la homoj kaj al la
Paroloj, kiujn ili diras! Ĉio
Doloras min, premegas min, kaj ĉio
Malproksimigas niajn korojn pli

Kaj pli! Sufiĉas nun! Sufiĉas nun!
Sufiĉas nun!

JAN.

Pomona! Kio ĵus
Okazis tiè ĉi?

POMONA.

Mi sufokiĝas
Sub tiuj plumbaj nuboj! Oni dirus,
Ke mia laca kor' pleniĝas, iom
Post iom, de malvarmo, tiu sama
Malvarm', pro kiu mortis via lando!

JAN.

Sed mia land', Pomona, baldaŭ ree
Alridos la printempon junan, gajan,
De lum', de kantoj kaj de floroj plenan,
Kaj belan, kiel Tivoliprintempo!

POMONA.

Eĉ se ĝi estus tute sama, kiel
La niaj, se sufiĉus unu nokto
Varmeta por malfermi ĉiujn florojn
En la kamparo, eble degeliĝus
Kanaloj viaj, sed neniam viaj
Animoj!

JAN.

Sed animoj niaj ne
De l' viaj diferencas; mi ne vin
Komprenas....

POMONA.

Ve! Vi estas kiel la
Aliaj, kaj vi ankaŭ eĉ ne sentas,
Ke mi ĉi tie estas ĉirkaŭita
De malamikoj!

JAN.

Kiel? Ne, ne vere!
Ĉu la gepatroj miaj unu vorton
Severan al vi diris?

POMONA, kun laca gesto.

Ne....

JAN.

Kaj, diru,
Ĉu unu fojon malamika estis
Kondut' ilia?

POMONA.

Ne, neniam....

JAN.

Ili
Pro ni suferis multe; ĉu per unu
Rigard', per unu gesto, ili tion
Al vi riproĉis? Ili amas vin....

POMONA.

Ne, ili malamegas min! Mi sentis
Ilian malestimon kaj envion
De la unua tago; ili ne
Paroli devis, por ke mi komprenu!
Koleras ili, ĉar ilian vivon
Eniris mi kaj ĝian kvietecon
Detruis, kaj ĉar via amatino
Mi estas. Ho, nenia vort' malkaŝas
Ilian penson, sed mi en iliaj
Okuloj legas, mi aŭskultas eĉ
Ilian silentadon, kaj mi scias,
Ke mi por ili restas fremdulino,
Uzurpulino!

JAN.

Mi certigas vin...!

POMONA.

Kaj tamen tio estas komprenebla!
Al ili mi ja venis el alia
Mondekstremaĵ'; malsamaj estas niaj
Ideoj kaj deziroj! Min mirigas
En ili ĉio, kaj en mi malplaĉas
Al ili ĉio! Kion ajn mi faras,
Kaj kie ajn mi estas, ĉiam ĝenas
Mi ilin! Ili min observas, kiel
Estaĵon strangan, kiu iras, kiu
Eksidas, kiu kantas kaj parolas,
Sed kiu tute, eĉ en sia nomo,
Ridinda estas!

JAN.

Vi eraras, mi
Ripetas!

POMONA.

Ili eĉ vin mem reprenas!

JAN.

Min? Mi vin amas super ĉio!

POMONA.

Nu,
Se tio estas vera, venu, ni
Foriru, ni reiru tien!

JAN.

Ni?
Foriri? Ne! Neniam!

POMONA.

Vi ne volas?

JAN.

Ne! Pensu, kiom min amegas miaj
Gepatroj; kiom ili dum du jaroj
Suferis; rememoru, ke je mia
Reven' mi suferigis ilin ree,

Ke ili nin akceptis tamen! Fine
Nun ili estas konsolitaj, jes,
Sed pli maljunaj; ili pli, ol iam,
Bezonas min.... Kaj nun vi volus.... Ne!
Pomona, tio estus malbonega!

POMONA.

Ĉu vi al ili oferdonos mian
Kaj vian vivon?

JAN.

Mian vivon?

POMONA.

Jes!
Pro kio mi por ĉiam volas nun
Forlasi tiun ĉi senartan landon?
Ne nur por la iamajn tagojn niajn
Revivi, sed por savi vian arton!

JAN.

Ĝi ne bezonas esti protektata!
Ĝi estas mia!

POMONA.

Vi ne diras, kion
Vi pensas!

JAN.

Certe....

POMONA.

Ne! Penikoj viaj
En viaj fingroj glaciiĝis!

JAN.

Sed....

POMONA.

Mi diras, ke vi dubas pri vi mem!
Mi scias tion, kio al vi mankas!
Vi mem ĝin sentas! Tiu ĉi vulgara

Medi', sen unu el la belegaĵoj
Tieaj, tremetigas vian manon!
Vi perdis vian fidon!

JAN.

Eble.... jes....
Ĉi tie ĉiuj miaj desegnaĵoj
Mallertaj estas, kaj nuancoj miaj
Malveraj.... Ĉu ne plu en la necesa
Medi' mi estas? Mi nescias, sed
Mi ŝanceliĝas, mi timetas....

POMONA.

Jen!

JAN, kviete.

Jes, mi konfesas, ke kelkfoje mi
Dubetas, sed mi estas certa, ke
Vi tro altŝatas la danĝeron, ĉar
Ĉi tiu ŝanceliĝo estas tute
Nedaŭra!

POMONA.

Sed rigardu ĉirkaŭ vin,
Rigardu, rigardadu! Nek modelon,
Nek majstron tie ĉi vi havas! Kie
Okuloj viaj serĉos ion belan,
For de l' unika lando de l' beleco?

JAN.

Mi havas vin!

POMONA.

Ho, vortoj!

JAN.

Ne!

POMONA.

Ĉu mi
Guidon anstataŭos? .... Se ĉi tie

Vi restos, via arto post du jaroj
Finita estos! Vi nur kelkajn skizojn
Mallertajn faros! Jam rigardu viajn
Pentraĵojn, tiujn kvazaŭlignajn virojn
Kolorigitajn, desegnitajn tute
Senarte! Ĉu vi jam forgesis nun
La Rafaelajn majstroverkojn?

JAN, kolerete.

Kion
Vi konas pri pentrart'?

POMONA.

Sufiĉe por
Vin kolerigi, ĉar mi diras veron!

JAN.

Ĉar por pentraĵo de Schedon' vi pozis,
Vi pensas, ke vi tial konas ĉiujn
Misterojn de l' pentrarto!

POMONA.

Ne, mi konas
Pri ĝi nenion, sed sufiĉe tamen
Por juĝi vian flandran arton!

JAN, provante ŝajni kvieta.

Ne
Disputu! Kion vi deziras?

POMONA.

Mi?
Foriri, jes, foriri, nur foriri!

JAN.

Ne eble, ni ne rajtas fari tion!
Ho, kia pento akompanus min!

POMONA.

Preteksto!

JAN.

Ho, Pomona, ĉu vi volus,
Ke ili mortu? Certe ili mortus!
Mi amas vin sufiĉe por oferi
Al vi, vi scias tion, mian vivon,
Sed....

POMONA.

Provu vian amon, forirante!
Vi amas min! Sed ĉu vi tiom min
Ankoraŭ amas, kiom dum la tago
De nia forvetur' el Italujo?
Ne, via amo ne plu estas Roma,
Ĝi estas amfantom' en koro tre
Kvieta! Viaj kisoj glaciiĝis!

JAN, provante ŝerci.

Se estas tiel, donu viajn lipojn!

POMONA.

Ne ŝercu! Mi malsana estas, eĉ
Mi febras!

JAN.

Sed....

POMONA.

De kiam mi vekiĝas,
Ĉagreno mia komenciĝas, kune
Kun miaj rememoroj! Kiom da
Mensogoj kaj da streĉoj mi bezonos
Por kaŝi tutan tagon miajn larmojn
Al vi! Ho, diru, ĉu vi mem ne sentas,
Ke la ĉielo blua, la venteto
Varmeta, la aero milda, donis
Al nia am' voluptan guston?

JAN.

Sed....

POMONA.

Ĉu vi ne sentas, ke pli ĉarme estas
Amata esti, ami, apud laŭroj?
Ĉe kiso kaj samtempe ĉe radio
De l' sun' tremeti, kaj ne scii, kiu
Kares' pli varma kaj pli dolĉa estas?

JAN, emociate.

Sendube....

POMONA.

Rememoru nian tempon
Feliĉan! Tiun tagon, kiam vi
En nia veturil' kondukis min
Al la gastejo de l' Mario-Monto!
Unuafoje ni pri am' parolis.
Varmege estis; ni eksidis en
La ĝardeneton; ni soifis, kaj
Vi Orvietan vinon mendis; mi
Ankoraŭ vidas ĝian orkoloron!
Mi trinkis; dum mi havis en la buŝo
Plengorĝon, vi alridis min kaj diris
Al mi : Mi volas mian parton! Kaj
Vi prenis ĝin!

JAN.

Pomona....

POMONA.

Rememoru
La varmajn noktojn de Septembro, tie....
Kaj vi komprenos, ke mi frostotremas
Ĉi tie, malgraŭ ĉio, malgraŭ vi!

JAN, altirante ŝin al si.

Pomona! Ho! Ĉe mian koron venu!
Ĉu mi ne ĉiam amas vin? Kaj ĉu

Ne ĉiu land', en kiu niaj lipoj
Kuniĝas, estas bela?

POMONA.

Ne, ho ne!

JAN.

Kaj kiel mi forgesus apud vi
La admirindajn tagojn travivitajn
En Italujo, kiam via amo
Talenton mian naskis! Tie mi
Artist' fariĝis; sed de vi dependas,
Ke mi fariĝu majstro nun, ĉar mi
De via amo estas la lernanto!
Vi estas la resum' de ĉio bela,
Kaj, se vi volos helpi min, mi estos
L'artisto plej glorinda en la mondo!
Nu, diru, ĉu vi volas?

POMONA.

Ne! Mi devas
Foriri!

JAN.

Kial?

POMONA.

Ĉar mi volas vivi!

JAN.

Ho! vi ne tiom nun min amas, kiom
La tagon, kiam Italujon ni
Forlasis; via koro aliiĝis!
Vi diris: « Ni foriru, ni foriru!
Ni ĉiam restu kune! Mi nenion
Bedaŭras! »

POMONA.

Mi malpravis! Mi nesciis,
Ke amo, kiel ajn ĝi estas granda,
Ne forgesigas la feliĉon hejman!

JAN, subite.

Ne absolute mi rifuzas. Ĉu
Vi volas iri al Gouda', al Til',
Al Roterdam'? Ni povas kien ajn
Vojaĝi... ne tro malproksimen de l'
Gepatroj.... Se la domon ni forlasos,
Sufiĉos....

POMONA.

Ne!

JAN.

La urbon....

POMONA.

Ne!

JAN.

Vi volas
Do min ekzili!

POMONA.

Ĉu ekzilo estas,
Al sia bela revo, tien, kie
La sun' leviĝas, iri?

JAN.

Kiom ajn
La horizonto brilas kaj allogas,
L'ekzilo komenciĝas, kiam oni
Transiris la hejmsojlon! Mi daŭrige
Admiras vian arton; ĝi altigis
Kaj ravis mian koron; mia longa
Lernado tie estis utilega;
Sed tamen mia forto nun devenas
De tio, ke mi estas ree hejme,
Kun ĝi, kun la Itala art'! Ĝi estas
En mi! Ĝi estas torĉo, kiu min
Lumigas....

POMONA.

Certe, kaj ĝi estingiĝos
Jam morgaŭ! Kaj la nokto regos! Vi
Ĉi tie havas ĉion, kion mi
Malamas : viaj vortoj, viaj gestoj
Kaj via art' malgrandaj estas, vi
Vivadas tro kviete....

JAN.

Tie ĉi....

POMONA.

Jen tio, kion vi bezonas : sidi
En la trankvila rondo familia
Kaj esti dorlotata!

JAN.

Sed komprenu....

POMONA.

Vi min malesperigas! Kiel bela
Estinta estus nia vivo! Kaj
Vi perdas ĝin! Vi volas ĝin vulgara!
Timante, ke tro malproksimen de
La tero viaj revoj portos vin,
Kruele vi elŝiras, unu post
Alia, ĉiujn plumojn el iliaj
Flugiloj! Nur por tio vi sufiĉe
Da forto kaj kuraĝ' konservis! Nu,
Laŭ via volo agu! Restu! Sed
Mi iros for, mi iros for!

JAN, pene.

Pomona,
Vi ĵus min vundis, kaj vi volas nun
La vundon pligrandigi! Tamen vi
Min amis, iam!

POMONA.

Mi ne estas certa!
Ni kredis, ke ni amas unu la
Alian; kaj ke kunigitaj estas
Animoj niaj, kiel niaj lipoj!
Sed tiel malproksima de la mia
Restadis via koro, kvazaŭ ni
Neniam unu la alian estus
Vidintaj!

JAN.

Ho, Pomona! vi parolas
Kruele! Ĉu al mi vi ion kaŝas?

POMONA.

Ne!

JAN.

Kio vin de mi forigas?

POMONA.

Vi
Forigas! Vi, de kiam ree en
Ĉi tiu dom' vi estas, la ĉagrenon
Kaj la bedaŭron mian ne komprenas!
Eĉ mi ne estas plu la sola, kiu
Posedas vian koron! Sed nun tio
Finita estas, ĉar mi iras for!

JAN.

Vi freneziĝas!

POMONA.

Kian sorton vi
Al mi prezentas! Ion timigantan,
Malluman, kion vi kuraĝas nomi
Feliĉo!.... Vivu tiun prozan vivon!
Amegu vian paĉjon, vian panjon!
Aŭskultu zorge la konsilojn klerajn

De via bona, dolĉa kuzineto!
Ĉe viaj vilaĝanoj sensentiĝu!
Ne plu artiste pensu : ili ne
Komprenos eble vin! Sed ne postulu,
Ke mi disfalon tiun vidu, ke
Mi partoprenu ĝin! Ne, mi ne volas
Plu vian flandran arton, mi ne volas
Plu vian flandran amon! Nun sufiĉas,
Kaj morgaŭ mi foriros!

JAN, kolere.

Ho, silentu!
Silentu!

POMONA.

Vi min sekvos, aŭ mi sola
Foriros!

JAN.

Mi ne ŝanceliĝas! Mi
Senlime amas vin, sed, aŭskultante
La voĉojn, kiuj volas min konduki,
L' ordonon de la devo mi obeas,
Kaj mi ne cedas al forlogo via!

POMONA.

Mi iros for!

JAN, pli kaj pli kolere.

Vi restos tie ĉi!
Mi ĵuras tion! Malestimu miajn
Familianojn, moku ilin, estu
Al ili maldankema; kredu vin
De ili subpremata, se vi volas!
Negrave! Sed vi estas mia, mia!
Kaj vi ĉi tie restos, ĉar mi volas!

POMONA.

Ni vidos!

JAN, minace.

Kaj ne plu eĉ unu vorton
Pri ili diru, ĉar neniam ili
Pri vi parolis, kiel vi pri ili!
Toleru ilin, kiel ili ĉiam
Toleris vin!

POMONA.

Ho, ne! Mi ilin ĉiujn
Malamas! Tiu Kaatje, nu, ŝi estas....

JAN.

Silentu! Ne pri ŝi parolu!

POMONA.

Kial?
Pro tio, ke ŝi amindumas vin?

JAN.

Ho, hontu!

POMONA.

Sed indiferenta estas
Al mi de nun konduto ŝia : mi
Foriros tuj!

JAN, krude kaptante ŝian brakon.

Ne!

POMONA, kun ekkrio.

Vi doloras min!

Jan lasas ŝin.

Vi min doloris!

JAN, honte.

Ne, ne estas vere!

POMONA, inter siaj dentoj.

Vi vidos, ke finiĝis ĉio!

JAN.

Ne
Proksima estas Rom'!

POMONA.

La lastan fojon
Mi petas vin.....

JAN.

Neniam, ne, neniam!

POMONA.

Nu, estas bone.

JAN, post silento.

Kion faros vi?

POMONA, ironie.

Mi devas ja obei.

Vidante, ke Jan reiras al ŝi.

Lasu!....

Jan ŝanceliĝas; poste li subite maldekstren forlasas la ĉambron. Pomona restas sola, starante apud la tablo. Vesperiĝas; estas jam preskaŭ mallume. Post kelkaj momentoj da ŝanceliĝo, ŝi senbrue eliras dekstren. Longa silento. Fine Kaatje eniras maldekstren. Kiel ĉiuvespere, ekbruliginte la lampeton, ŝi fermas la fenestrajn kovrilojn, ŝi ekscitas la fajron, ŝi ordigas la ĉambron. Dum ŝi tiel okupas sin, tra la funda pordo eniras la patro, varme envolvite.

KAATJE.

Bonan
Vesperon, patro!

LA PATRO.

Same, Kaatje.

KAATJE, helpante lin por demeti lian mantelon.

Donu
Mantelon vian.

LA PATRO, proksimiĝante al la kameno

Vintro amas nian
Holandon, kaj geedzoj nur malofte
Interkonsentas tiel bone!

KAATJE.

Ĉu
Do tiel frostas?

LA PATRO.

Pro la vento, mia
Vizaĝo fendetiĝis. Ho, la nokto

Maldolĉa por la vojirantoj estos!....
Sed kie estas panjo?

KAATJE, montrante la maldekstran ĉambron.

Tie.

LA PATRO.

Kaj
Ĉu Jan ankoraŭ estas hejme?

KAATJE.

Li
Eliris.

LA PATRO.

Sole?

KAATJE.

Jes.

LA PATRO, rigardante ŝin.

Vi ploris?

KAATJE.

Mi?
Ne....

LA PATRO, dum la Patrino eniras maldekstre.

Estis kvazaŭ.... Mi malsatas kaj
Volonte vespermanĝos; estas tempo.
Patrino, ĉu vi aŭdas?

LA PATRINO.

Jes, sed iom
Da pacienc' ankoraŭ! Jan....

JAN, eniras tra la funda porto. Li rapide demetas sian mantelon.

Bonan
Vesperon, patro.

LA PATRO.

Same, fil'! De kie
Vi venas?

JAN.

Mi enspiri la eksteran
Aeron volis dum momento. Kie estas
Pomona?

LA PATRINO.

En la ĉambro.

JAN, elirante maldekstren.

Nu, mi vidos.

KAATJE, al la patro, kiu eksidis apud la fajrejo.

Kaj vi, ĉu vi promenis, patro?

LA PATRO.

Ne,
Mi iris al la muelej'....

LA VOĈO DE JAN, ekstere.

Pomona!

LA PATRO, al Kaatje.

Al Jakob mi paroli devis....

JAN, reenirante, malkviete.

Kie
Ŝi estas?

LA PATRINO, montrante la ŝtuparon.

Eble supre.

Jan rapide supreniras la ŝtupojn kaj eniras la pentrejon.

LA PATRO, al Kaatje.

Oni diris
Al mi, ke li, dum tiu ĉi vetero,
Aljungas la maljunan ĉevalinon!

KAATJE.

Nepardoneble! Fi!

LA PATRO.

Ĉu ne?

LA VOĈO DE JAN, en la pentrejo.

Pomona!
Pomona!

KAATJE.

Kiaj krioj!

LA PATRO, daŭrigante.

Kaj mi pensis :
Se ni en nian stalon metus....

JAN, remalsuprenirante la ŝtupojn.

Kie
Ŝi estas? Mi ŝin vane serĉas!

LA PATRO, ekridante kaj sin turnante al li.

Por
Venigi la edzinon, oni devas
Pli laŭte krii! Ĉu ne vere, panjo?...

JAN, emociite kaj pli kaj pli malkviete.

Sed en la tuta domo mia voko
Aŭdebla estas! Ho, Pomona!

Li reeliras maldekstren.

LA PATRO, al Kaatje.

Nu,
Ĉu vi ne pensas...?

KAATJE.

Bone, tre maljuna
Ĝi estas jam; mi povos bone ĝin
Dorloti....

JAN, reeniras dekstre, konsternegite.

Dio!... Ŝia ĉambro estas
Malordigita; ĉio estas disa....

LA PATRINO, malkviete.

Sed kio estas?

JAN.

Oni tamen eble
Ŝin vidis....

LA PATRINO.

Sed....

LA PATRO, ankoraŭ serĉante.

Ne retrovebla?

JAN, malkvietege.

Patro,
Mi estas certa, ke ŝi kuris for!

LA PATRO, ekstarante.

Ŝi kuris for...?

JAN.

Ho, patro, nekredebla
Sed vera tio estas! Ni disputis!
Ŝi volis, ke al Rom' mi iru ree!
Ŝi diris : Mi foriros! Kaj nun ŝi
Foriris!... Kiam ŝi enpakis siajn
Objektojn, certe oni vidis ŝin?

LA PATRINO.

Ne!

LA PATRO.

Tamen, Jan....

JAN, malespere.

Pomona!

Al Kaatje.

Vi, ĉu vi
Ŝin vidis?

Al sia patrino.

Vi?

LA PATRINO.

Ne, mi nenion scias...

LA PATRO.

Vi malkvietegiĝas!

JAN.

Mi malpravis!
Mi ne atentis! Jes, mi timis ion!....
Kaj nun mi babiladas! Sed... sed kie
Ŝi estas? Kie estas eble, ke ŝi....

LA PATRO, provante kvietigi lin.

Sed, filo...!

JAN.

Por kompreni, oni devas
Ŝin koni! Jen! Ŝi diras : mi foriras,
Kaj ŝi foriras!

LA PATRINO.

Ĉu vi estas certa...?

JAN, malespere.

Sed kie serĉi?

LA PATRO.

Tiel oni ne
Forkuras!...

JAN.

Kie serĉi ŝin?... Patrinjo,
Terure mi suferas!

KAATJE, vidante lian suferon, subite.

Jan, aŭskultu....
Al mi Pomon', en la momento, kiam,
Ne respondante al demando via,
Subite mi eliris, pri Italoj
Parolis, kiujn ŝi renkontis....

JAN.

Kie?

KAATJE.

Proksime de l' preĝej'. Ŝi diris, ke
Kun ĝojo ili interparoladis
Kun ŝi.... Ĉu ŝi ne turnis sin al ili?...
Jen ĉio, kion scias mi....

JAN.

Sed kial,
Malspritulino, vi ne diris tion
Pli frue?

KAATJE.

Mi nur rememoris nun....
Pardonu....

JAN, irante al la funda pordo.

Bone, bone, mi rapidos.

LA PATRINO, volante haltigi lin.

Ho, estu singardema!

JAN.

Kial?...

LA PATRINO.

Tiuj
Vaguloj estas malfidindaj kaj
Multnombraj! Mallumege estas!

JAN, ekscitite.

Mi
Ŝin revenigos, ĉu vivantan ĉu....

LA PATRO, volante ankaŭ haltigi lin.

Sed, Jan....

JAN.

Ne, ne! ĉi tien ŝi revenos!
Ŝi estas mia! Mi plenumas devon!

Li kuras eksteren.

LA PATRINO.

Dio!

LA PATRO.

Li pravas, ŝi edzino lia estas....

LA PATRINO, petegante, al la patro.

Lin sekvu!.... Helpu lin!

LA PATRO.

Mi iras.

Li rapide prenas sian mantelon kaj sian ĉapelon, kaj ankaŭ eliras tra la funda pordo. La patrino kaj Kaatje restas solaj.

KAATJE, kvazaŭ subite ŝia koro komprenus.

Ho,
Patrino, panjo! Ŝi ne estas lia
Edzino!

LA PATRINO.

Kio?... Kio vin rajtigas
Supozi...? Ĉu li diris ion? Ĉu
Vi scias ion?

KAATJE.

Ne, nenion.... mi
Nenion scias.... Sed mi estas certa!

TIEL FINIĜAS LA TRIA AKTO.

KVARA AKTO

La printempo venis; ĝia varma lumo ĝojigas la ĉambron, en kiu interparoladas Jan kaj lia patro.

LA PATRO, krude.

Forpelu tiujn memoraĵojn!

JAN.

Mi
Kontraŭbatalas ilin....

LA PATRO.

Ne. Infano
Vi estas! Kial ne almenaŭ provi
En la labor' amita trovi la
Forgeson, kiun via kor' bezonas?

JAN, malgaje, montrante la pordon de sia pentrejo.

Mi fermis tiun ĉambron kaj ne plu
Eniros ĝin. Kviete mi parolas.
Mi scias, jes, ke tie estas miaj
Unuaj verkoj, ĉio, kio iam
Plej bona mia kuraĝigo estis;
Sed, ĉar la estinteco ankaŭ tie
Ripozas, estas preferinde ne
Ĝin veki.

LA PATRO, malkontente.

Vian kvietecon mi
Ne fidas. Vian resaniĝon mi nur

Esperos, kiam, kun okuloj brilaj,
Al mi vi diros : Mi laboris bone
Hodiaŭ!... Ĉu vi pensas, ke jam nun
La tasko via estas plenumita?
Ĉu tiuj bedaŭrindaj...

JAN.

Kiel mi
Forgesus! Ĉiam nur al tio mi
Pensadas! Ho, mi volus scii...!

LA PATRO.

Kion?

JAN.

Dum tiu nokto, kien ŝi forkuris?
Ho, kien? Rememoru, kiel ni
Ŝin serĉis! Tiuj homoj certe ŝin
Kaŝadis, kvankam ili dir....

LA PATRO, kolere.

Sufiĉas!
Sufiĉas! Mi jam diris, ke vi devas
Forgesi tion! Mi ne volas, ke
Ĉi tie io ĝin rememorigu!

JAN, surprizite pro tiu kolero.

Sed, patro....

LA PATRO, irante al li.

Jan, aŭskultu! Estu ni
Sinceraj! Kiam, antaŭ kvar monatoj,
Virino tiu vin forlasis, ni
Kompatis vin, sed nun ni scias, ke vi
Meritis tiun sortofrapon!

JAN.

Kiel?...

LA PATRO, daŭrigante.

Via
Patrin' kaj mi ne sciis tiam, ke....
Edzino via rajtas vin forlasi!...
Ni ambaŭ je reveno via kredis
Naive ĉion, kion vi rakontis
Al ni pri via idili' kaj via
Edziĝo. Sed ni scias nun!

JAN.

Permesu...

LA PATRO, provante ŝajni kvieta.

Mi ne kulpigas ŝin. Ĉu ŝi elpensis
La ruzon, dank' al kiu ŝi ĉe ni
Ekloĝis? Eble... Tamen ŝi ne estas
Pli kulpa. Ŝi mizerulino estas,
Kaj ŝi sufiĉe punis jam sin mem!
Cetere, estas kompreneble, ke
Ŝi agis tiel; iu tia havas
Nek nian bonmorecon, nek la senton
De l' devo, kiel ni.... Kolero mia
Al ŝi ne iros. Kontraŭ kiu mi
Koleros, se bezone, nun vi scias!

JAN.

Aŭskultu, patro....

LA PATRO.

Ne! mi ne dezias
Aŭskulti vin! Mi scias, kiel vi
Vivadis ambaŭ, ne geedziĝinte!
Mi scias, kiel, ree alveninte
En la gepatra hejm', vi trompis nian
Konfidon, ĉu pro maltimego, ĉu
Pro sensaĝeco! Kaj vi devus ĝoji

Pro ŝia malapero, ĉar post kelke
Da tagoj, eksciinte tion, kion
Mi scias nun, mi estus forpelinta
Vin ambaŭ! Mia nepra vol' do estas,
Ke oni ne parolu plu pri tio!...
Dirante tion, mi eĉ estas iom
Mokinda, ĉar mi tiel bona, kiel
Kredema estas!... Vi komprenas do :
Mi ne kompatas vin! Mi volas nur,
Ke vi reiĝu viro energia
Kaj saĝa, baldaŭ meritonta la
Pardonon..., kiun ni al vi antaŭe
Jam donis. Nu?

JAN, tre emociate.

Vi estas bona, patro....
Mi volus, batalante, danki vin,
Sed....

LA PATRO.

Kio?

JAN.

Mi suferas tiom!

LA PATRO.

Jen
La puno via! Sed, se vi suferas,
Suferu kiel viro, kaj doloro
Ne estas vira, kiam ĝi detruas
La laborvolon kaj la krepotencon!
Ĉu vi neniom plu valoras? Ĉu vi
Ne estas plu artisto? Ĉu la mondo
Subite tiel mallumiĝis, ke
Nenio indas plu pentrata esti
Aŭ desegnata? Ĉu tri larmoj jam
Estingis vian flamon?

JAN.

Se mi povus!...
Ho patro, sed mi....

LA PATRO.

Volu, vi sukcesos!
Nur diru : Tiujn estintaĵojn mi
Forviŝas!... Kaj, por eklabori ree,
Foriru, se bezone, ree!

JAN.

Mi....
Foriri?...

LA PATRO.

Jes! Ĉu tie ĉi vi volas
Labori? Ĉu vi volas reeniri
En vian laborejon?

Jan faras senkuraĝan geston.

Bone!... Iru
Do aliloken. Tie ĉi vi ne
Sukcesus trovi la necesan forton.
Medion junan, vivan vi bezonas,
Gepatroj viaj estas ja maljunaj....

JAN.

Sed kien vi deziras, ke mi iru?

LA PATRO.

Tutsame! Ne plu tien! Oni ja
Laboras tiom en Holando, kiom
En Rom'! Aŭ kial vi ne irus al
La juna Rubens, kiun oni tiom
Laŭdadas? Ŝajnas, ke longtempe li
En Italujo loĝis. Eĉ se li ne
Pentristo granda estas, eble tamen
Li povas esti klera profesoro,
Al vi konsilojn bonajn doni, kaj
Pri art' paroli?

JAN, senkuraĝe.

Eble.

LA PATRO.

Eble? Ne.
Vi devas diri : « Mi promesas! » Kaj
Ni refariĝos tiam la bonegaj
Amikoj, kiuj ni antaŭe estis....

JAN, tuŝate de tiu boneco.

Nu, mi promesas : por vin kvietigi
Mi reforiros....

LA PATRO, aŭdante malproksiman sonoradon.

Oni de l' preĝejo
Revenas....

Li reiras al Jan.

Senprokraste?

JAN.

Jes.

LA PATRO.

Bonege.
Mi vin retrovas. Sed necese estas,
Ke nun ĉi tiun planon ankaŭ via
Patrin' aprobu....

JAN.

Vi parolu mem
Al ŝi; pli bone estos!

Jan eliras dekstren. La patrino kaj Kaatje, kiuj estas dimanĉmaniere vestitaj, kaj tenas sian preĝaron en la mano, eniras tra la funda pordo.

KAATJE, gaje.

Kiel bela
Vetero! Ni laŭiris la kanalon;
La suno jam varmega estas, kaj
En la aer' parfumo estas, kiu
Rememorigas pri la mar', pri rozoj

Kaj pri miel', parfumo tia, ke
Mi kredis flari la odoron de l'
Ĉiel'!

LA PATRO.

Pro kio tiel bone vi
Parolas?

KAATJE.

Ĉar mi sentas min feliĉa,
Kaj ĉar nenio estas pli ĝojiga,
Ol bela posttagmezo dum printempo!

LA PATRINO.

Ĉu Jan ne estis tie ĉi?

LA PATRO.

Jes, ni
Interparolis.

LA PATRINO.

Kiel estas li?

LA PATRO.

Malgaja, ĉiam, sed pli bona tamen,
Mi pensas.

LA PATRINO, malgaje.

Oni alparolas lin;
Li ŝajnas aŭskultadi la konsilojn
Al li donatajn; poste, kiam oni
Silentas, oni sentas, ke li eĉ
Pli malproksima estas, ol antaŭe!

LA PATRO.

Ne, ne, edzin'! Li pliboniĝis! Certe,
Li ne ankoraŭ estas gaja, sed
Mi kuraĝigis iomete lin,
Al li mi montris lian devon, kaj
Mi ankaŭ....

LA PATRINO.

Ankaŭ....?

LA PATRO, ŝanceliĝante.

Nu, mi diris fine,
Ke, se necese estus, ke li ree
Foriru — ne tro malproksimen, nur
Dum kelke da monatoj —, certe vi
Konsentus, kiel mi.

LA PATRINO, malkvietege.

Kaj...?

LA PATRO.

Li komence
Rifuzis, sed li poste sentis, ke
Pardon' kaj savo lia ja dependas
De tio. Li foriros.

LA PATRINO.

Kien? Kiam?

LA PATRO.

Al Antverpeno, post tri tagoj.

Ame.

Panjo,
Li devas revekiĝi! Helpu lin!
Kuraĝon!

LA PATRINO.

Mi al tio pensis jam.
Sed la rimedo min timigas.

LA PATRO.

Kial?
Ĉu estas pli efika kuracilo
Por li, ol la studado! Timu lian
Senokupadon!

LA PATRINO.

La soleston lian
Mi timas pli! De kiam ŝi foriris,
Li ne kapablas plu restadi sola.

Li ploris, sed li restis... tial, ke
Li apud si bezonas niajn korojn!

LA PATRO.

Bonege, sed ĉu li ne pli bezonas
Amikojn junajn, kiel li, medion
Pli vivan?

LA PATRINO.

Por forgesi, antaŭ ĉio
Li devas konsoliĝi. Kaj mi timas,
Ke li malforta estos, kaj venkata
Per ia konsolaĵ' pli malĝojiga,
Ol liaj larmoj!

LA PATRO.

Kial, ĉar li amis...?

LA PATRINO.

Ĉar li amata estis! Tiun ĝojon
Li ĝuis, kaj, konante ĝin, se li
Sufiĉe resaniĝos por denove
Al ĝi ekpensi..., ĉu ne en la fundo
De sia kor' li antaŭsentos, ke
Virinokuloj nur, virinrideto
Forigos liajn larmojn, kiujn kaŭzis
Virin' alia?

LA PATRO.

Nu?

LA PATRINO.

Sed for de ni
Kaj sola, senkuraĝa, se li cedos
Al la unuaj dolĉaj vortoj, vortoj
De amo konsolanta, sed malinda
Je li, ĉu vi ne lian hodiaŭan
Ĉagrenon ŝatas pli?

LA PATRO.

Sed li ne tiel
Facile enamiĝos....

LA PATRINO.

Tiu, kiu
Dolorprematan lian koron volos,
Ĝin havos!

LA PATRO, senpacience.

Li do ĉian memrespekton
Perdinta estus! Vi ja scias....

LA PATRINO, ekplorante.

Ho!
Mi scias, ke li nur bezonas esti
Amata! Oni prenu lian koron,
Por ĝin varmigi! Ĉar mi scias, ke
Necese estas, ke virin' al li
Redonu la perditan feliĉecon,
Al tiu mi plorante revas, kiu
Lin savos!

LA PATRO.

Tamen....

LA PATRINO.

Se vi volas, li
Foriru!

LA PATRO.

Vi malkvietega estas!

LA PATRINO, elirante maldekstren.

Ne, lasu plori min!

LA PATRO, al Kaatje, kiu kun almovo de kompato, volas sekvi ŝin.

Mi iros; restu....
Infan', se ni ne havus vin, ho, Dio!...

Li premas ŝin en siajn brakojn.

KAATJE, kisante lin.

Sed vi min havas ja!

La patro eliras maldekstren. Restante sola, Kaatje revadas, starante apud la tablo; poste, ŝi ripetas la jenajn vortojn, viŝante larmon:

Al tiu mi
Plorante revas, kiu savos lin!...

Dum tiu momento, Jan eniras dekstre. Li ŝajnas malgaja. Ne rigardante Kaatj'on, li iras al la fundo de la ĉambro.

KAATJE, timete.

Ĉu vi eliras?

JAN.

Ne.

KAATJE, post silento.

En la ĝardeno
La floroj....

JAN.

Mi jam iris.

KAATJE, post rea silento, alproksimiĝas al la fenestro.

Ĉu mi povas
Malfermi?

JAN, indiferente.

Se vi volas.

KAATJE, malfermas la fenestron. Ŝi rigardas Jan, poste, ŝanceliĝinte.

Kial vi
Nenion faras?

JAN, kolere.

Vi nun ankaŭ! Jen
Sufiĉe da riproĉoj!

KAATJE, preskaŭ plorante.

Ho, vi scias,
Ke mi parolas ne por mi!

JAN.

Por kiu?

KAATJE.

Por panjo! Ĵus ŝi ploris! Ĉiam vi
Aspektas senespera!

JAN.

Ne!...

KAATJE.

Vi pensas
Nur al sufero via. Provon ŝi
Esperas....

JAN.

Ho, mi provis tiel ofte!

KAATJE.

Mi scias, ve!

JAN.

Ho, ne! ne, vi ne scias!...
Sed kial mi pri tio reparolus?

KAATJE.

Sed, se vi volus....

JAN, senpacience.

Se mi volus kion?
Riproĉi estas tre facile! Oni
Nur diras : « Se vi volus, vi sukcesus! »
Jes, kiam oni ne suferas, tio
Tutsimpla estas!

KAATJE, malgaje.

Ĉu vi kredas nian
Turmenton tiel egoista?

JAN, kvietiĝinte.

Ho,
Pardonu! Mi maljusta estas..., sed
Mi estas malgajega!

KAATJE.

Jes, mi scias,
Kaj tial mi deziris, al kor' via
Dolorpremata, malkvieta, kiu
Bezonas flegon, kiel malsanulo,
Konsilon bonan doni, tiun sunon

Montrante, incitantan al promeno.

JAN.

Promenadante, mi ankoraŭ pli
Malgaja estas! Ĉiu paŝo min
Realkondukas al rememoraĵo,
Kaj la ĉiel' tro blua estas, por ke
Mi ne emociiĝu!

Post silento.

Preskaŭ tamen
Mi estis gaja, ĵus, subite la
Veluron kaj la silkon ekvidante
De viaj brilaj, okraj aŭ purpuraj
Tulipoj! Mi admiris ilin kaj
Ilian energian persistemon.
Fieraj ili ŝajnis, ĉar la vintrajn
Minacojn ili kontraŭstaris, la
Frostnoktojn, la malsekon, kaj ĉar iom
Post iom ili siajn fajrkalikojn
Malfermis! La trunketoj estis firmaj,
La foliaro densa; ili estis
Nek palaj, nek malgajaj, nek malfortaj,
Sed viraj kaj fortikaj; oni vidis,
Ke, superante la iridojn kaj
Diantojn, ili sentas sin la reĝoj
De l' floroj! Dum momento ili min
Allogis, kiel ĉio forta, ĉio
Natura, ĉio vera, kaj mi havis
La iluzion vidi la animon
De mia land' en tiuj ĉi tulipoj!....
Ĉu tio ne infana estas?

KAATJE, ridetante.

Ne, mi
Ne trovas!

JAN.

Mia lando! Mi esperas
Ankoraŭ, ke ĝi estas tie, tie!
Vi scias ja.... Sed kiel scius vi!

KAATJE.

Nu, mi divenas! Ĉio, kio vin
Doloras, ĉio, kio vin ĉagrenas,
En nia koro havas sian eĥon
Kaj nin malkvietigas! Mi komprenas
La kaŭzon de la larmoj viaj!

JAN.

Ho,
La kaŭzon!...

KAATJE.

Jes! Vi vivas for de ŝi,
Vi amas ŝin, sed via dev' ordonas
Forgesi ŝin. Kaj tial vi suferas!

JAN, malgaje.

Ne!

KAATJE.

Kial diri « ne »? Kaj kial ĉiam
Restadi sola? Ho, mi ne ekprovos
Konsoli vin! Sed, viajn larmojn ne
Viŝante, ni dezirus, ke vi ne
Pensadu ĉiam al la sama....

JAN.

Al
La sama... kiu? Al Pomon'? Rigardu :
Okuloj miaj estas sekaj; mi
Kuraĝas elparoli ŝian nomon,
Ĉar mi ne volas plori plu pro ŝi!

KAATJE, ame.

Sed kial, se ĉagreno via povas

En larmoj trovi ian kvietigon?
Ĉar tio, kio nun malesperigas
Nin ĉiujn, estas la rezigno jena,
Doloro, plena! Kaj se morgaŭ, kvankam
Ne forgesinte la malĝojon vian,
Vi ilin ree alparolus, kiel
Artist' parolas, se vi volus ree
Eksidi antaŭ vian stablon, tio
Por ili estus ĝoj' nepriskribebla!

JAN, malrapide.

Kaj tio ne plu estas ebla! Certe,
Mi ĉiam vidas ŝian bildon inter
La mond' kaj mi, kaj mi retrovas ŝian
Vizaĝkoloron, ŝiajn formojn, la
Allogon de la sintenado ŝia
En la konturoj, la koloroj de l'
Objektoj! Sed mi kredas tamen, ke
Mi ne ŝin amas plu, kaj mi suferas
Ne tiom, ĉar mi ne ŝin sekvis, kiom
Ĉar ŝi la vivon mian neniigis!

KAATJE, mirante.

Ŝi neniigis...?

JAN.

Jes, mi vin mirigas,
Dirante tion! Kiam ŝi forkuris,
Ne aŭskultante mian lastan vokon,
Mi pensis, ke mi perdas mian amon,
Nur mian amon; malespere mi
Al ŝia — iam mia — korpo kriis!....
La amdoloroj resaniĝas; tamen
Mi restis sen kuraĝ', sen forto.... Kial?
Ĉar mi komprenis, ke mi perdis pli,

Perdante ŝin, ol ŝi doninta estis
Al mi, kaj ke, dum la terura nokto
De la forkuro ŝia, ŝi forportis
Kun sia korpo, siaj lipoj, siaj
Okuloj, ĉiujn miajn strecojn, mian
Kuraĝon tutan, ĉiujn miajn revojn!

Ekscitiĝante.

Ho! vi ankoraŭ kredas, ke mi pensas
Al ŝi, ke mi revokas ŝin image,
Kaj, kiam vi ekvidas, ke mi ploras,
Vi diras : « Ploru ŝin, ĉar vi ŝin amas! »....
Mi ne plu ploras ŝin! Mi ploras min!

KAATJE.

Jan, mi petegas!

JAN.

Lasu min paroli
Pri tio! Kredu min, mi provis ĉion!
Ĉiumatene mi mallaŭdis mian
Senokupadon, kaj mi diris : Nun
Mi replenumos mian taskon, mi
Daŭrigos la interrompitan revon!...
La horoj pasas; la entuziasmon
Iaman pene mi eksenti volas;
Mi zorge provas la nuancojn de l' objektoj,
La ludojn de la lum' atenti! Vane!
Nenion! Mi nenion vidas sur
La blanka tol'! Senlumaj estas miaj
Okuloj, kaj sensenta mia koro!

KAATJE.

Jan!

JAN, ekscitiĝante pli kaj pli.

Rememoru! Tiun lastan tagon
Ni diskutadis; ŝi min mokis kaj

Pentraĵon mian. Ŝi certigis, ke
Koloroj miaj estas neagrablaj
Kaj grizaj, la kunmet' malbona, la
Desegno mallertega! Ŝi parolis
Pri la Hebeo de Bronzino; mi
Protestis, kaj mi diris, ke ŝi estas
Malprava! Sed ŝi estis prava!

KAATJE.

Dio!

JAN.

Al ŝi mi estis dediĉinta, ve!
La kulton, kiun por l' Itala lando
Mi havis! Kiam ŝanceliĝis mi,
Fervoron kaj kuraĝon mi retrovis,
Nur rigardante la okulojn ŝiajn.
Rigardo ŝia min rekvietigis;
Mi pensis : Mian idealan celon
Ŝi konas; ŝi min helpos por ĝin trafi....
Sed ŝi kaj mia gloro malproksimen
Forkuris; mi neniam ilin plu
Retrovos, ne, neniam! Mi ne havas
Plu amon, kaj mi ne plu scias pentri!

KAATJE, provante lin kvietigi.

Ho, Jan! Kuraĝon vi retrovos iom
Post iom! Se vi....

JAN, ne aŭskultante ŝin.

Mi enŝlosis min
En mia laborej', komence. Mi
Multege volis pentri, ne plu pensi
Al ŝi, kaj fini mian verkon. Ve!
Penadoj vanaj! Mi senkuraĝiĝis,
Mi kriis tute sole mian malesperon,

Mi preskaŭ freneziĝis! Antaŭ mi
Seninterrompe pasis sekvantaro
Da bildoj! Apolono kantis apud
Sibiloj; malbenito falis mezen
De l' skol' Atena; en dancado
Sovaĝa, sanktulinoj, virgulinoj,
Martiroj turniĝadis kun voluptaj
Diinoj nudaj! Kaj mi aŭdis dume
La Rafaelajn kantojn kaj la kriojn
De Miĥael'-Anĝel'!...

KAATJE.

Ĉu fantazio
Ne estis via fort', antaŭe?

JAN, ekscitite.

Ne!...
La art' itala min allogas, sed
Ĝi min dispremas kaj min neniigas!

KAATJE.

Vi diris tamen....

JAN.

Frazoj, frazoj, frazoj!
Ho, tiuj majstroj! Mi esperis tiam
— Infana rev'! — egalvalori ilin!

KAATJE.

Sed la pentraĵo via....

JAN, ironie, irante al la ŝtupareto.

Ĉu vi volas
Ĝin vidi, la Festenon de la Dioj?

KAATJE, dum Jan supreniras la ŝtupojn.

Ĉu ĝi finita estas?...

JAN, kun ekridego.

Jes, finita,

Finita!

Enirante la pentrejon.

Tuj vi vidos! Tuj vi vidos!

Li rapide malfermis la pordon, malaperas dum momento, kaj revenas, tenante grandan pentraĵon tute disŝiritan; li ĝin svingas, malsupreniraute la ŝtupojn.

Rigardu! Rigardadu!

KAATJE, kun ekkrio.

Dio!

JAN, pli kaj pli ekscitiĝante.

Nova
Samsono, mi disfrapis la sanktejon!
Mi la lazuron per timinda mano
Disŝiris! Rigardadu! La nektaro
Elfluis sur la tablon; la festeno
Orgi' fariĝis! Miaj fingroj faris
Komencon, miaj pugnoj la ceteron!
Sed nun finita estas la majstraĵo,
Ĉar mi, uzante miajn lastajn fortojn,
Subskribis mian verkon per kraĉaĵo!

Ploregante, li ĵetas la pentraĵon en angulon de la ĉambro.

KAATJE, petegante.

Jan! Jan! Mi petas!

JAN, pasigas sian manon sur sian frunton kaj subite kvietiĝas.

Jes, vi estas prava.
Mi faras gestojn kvazaŭ bubo; tiuj
Ĉi krioj estas nur mokindaj! Nun
Finite! Tie mia pentrilaro
Ripozas! Mi ĝin ploras!

Malgaje.

Ho, ĉi tiu
Ĉagren' pli grava estas, ol ĉagreno
Pro amo! Amajn vortojn oni ja

Retrovas! Sed retrovi koron, kiu
La samajn sentojn havas, kiel mi,
Spiriton, kiu entuziasmiĝas
Samtempe, kiel mi, retrovi iun
Por rebruligi kaj daŭrigi flamon
En mi! Ve! Kie trovi tion?

KAATJE, post longa silento, pene parolante.

Kion
Vi faros? Eble estus bone....

JAN, kun laca gesto.

Jes,
Mi scias, forveturi! Patro ĵus
Pri tio jam parolis. Mi foriros!

Malgajege.

Mi vidos, kiel faras la artistoj,
La veraj! Mi de urb' al urbo iros
Senideale, senespere!... Ni
Pri tio nun silentu!...

Post silento li iras al la fundo kaj rigardas tra la fenestro.

Kiom brilas
La suno!

Li revas dum momento.

Dum printempo tia, gaje
Al Italujo mi foriris!... Mortis
Gajeco mia! Silentadas nun
La Muzoj, kiuj vokis min al si!

Dum li diris la jenajn lastajn vortojn, Kaatje, kun premegita koro, eksidis apud la fenestron; kvazaŭ senkonscie ŝi metis sur siajn genuojn la puntkusenon, kaj rekomencis labori. Jan malatente alproksimiĝas al ŝi; poste, li rigardas ŝian laboron. Post momento li diras al ŝi:

Beleta desegnaĵ'!.... Ĉu tio vin
Amuzas?

KAATJE, iom sufere, kun malgaja rideto.

Jes, ĝi estas mia arto,
Arteto mia.... Mi ĝin amas, ĉar

Ĝi nur postulas la rigardon por
Konduki la plektilojn, dum ĝi lasas
Libera mian penson....

JAN.

Ĉu ĝi estas
Tre malfacila?

KAATJE.

Ne... kaj la aperon
De la puntaĵoj, nur per kelke da
Fadenoj, mi volonte vidas, iom
Post iom.... Oni nur bezonas kelkajn
Fadenojn, kelkajn pinglojn.... Miaj manoj
Rapide, gaje plektas, kvazaŭ ili
Klavcenon ludus.... Kaj aperas jen
Steletoj, rozoj, palmoj, inter si
Miksitaj.... Kaj fadenoj ili tamen
Nur estas.... Floroj flugas for, laboras
La fingroj miaj, kaj malpeze, kiel
Paradizbird', aperas la puntaĵo....
Kaj dume... kun anim' malpeza ankaŭ
Mi sekvas mian revon, malproksimen....
Mi nur bezonas pinglojn kaj fadenojn....

JAN, tuŝate.

Kaj kien flugas tiu revo?

KAATJE, levante la kapon.

Kien?
Mi mem ne scias.... Neniaĵo vekas
Kaj logas ĝin.... Sed ĝi ja restas ĉiam
Nur revo de infano, kiu scias
Nenion!

JAN.

Kiel!

KAATJE.

Mi nenion scias!

Eĉ, se pri tio restus dub', sufiĉus,
Ke vi parolus! Mi aŭskultas vin;
Vi diras tion, kion art' postulas;
Mi provas sekvi vian pensflugadon;
Al ideala cel' vi levas la
Okulojn.... Jes, mi sentas, ke ĝi estas
Belega.... Sed... sed mi komprenas tiel
Malbone!...

JAN.

Ne!

KAATJE.

Jes, jes! Mi kredis iam,
Ke mi komprenas. Kiam via voĉo
Konvinke, febroplene, al mi montris
La landon de l' palacoj kaj de l' floroj,
La landon de l' beleco, — kiel mi
Ne estus admirinta ĝin kaj vin?
Kaj kiel ne vin kredi, kiam vi
Al mi certigis, ke en tiu lando
Kun siaj majstroj egalitaj de
Neniu el la niaj, vi imitos
La belegaĵojn, kaj fariĝos majstro?...
Sed de reveno via mi rigardas,
Mi pensas.... Min tremigas la strečado
De vi provita, via revo min
Timigas! Ho, pardonu, mi nur estas
Infan'! Sed Italuj' al mi nun ŝajnas
Ĝardeno de kreskaĵoj admirindaj
Tutplena... kies floroj ĉiuj estas
Venenaj!

JAN.

Ne! La floroj estas belaj,
Bonfaraj, diaj! Nur por malfortuloj,

Venenaj ili estas!

KAATJE.

Kio, por
La malfortuloj...?

JAN, malĝojege.

Ne sufiĉe forta
Por la batal' mi estis, kaj mi estas
Venkita.... Estas juste, la venkitoj
Malpravas!... Sed doloras tiom, kiam
Subite oni konvinkiĝas, ke
Freneza estis revo, vana la
Strečado, ke la cel' tro alta estis,
Kaj ke, post tiom da klopodoj, oni
Nenion trafis! Ve! jen mia sorto,
Jen! Kaj nenio estas plu farebla!

Dirante tiujn ĉi lastajn vortojn, Jan eksidis, premegata de doloro, sur seĝon iomete malproksiman de Kaatje, kaj revadas longtempe. Kaatje, daŭrige sidante apud la fenestro, ne plu laboras; ŝi ŝajnas profunde pripensadi.

KAATJE, post longa silento kaj kvazaŭ nur al si mem parolante, mallaŭte.

Nenio plu?... Kaj tamen... ĉu ne estus
Pli bone, ĉar nenio nin similas
En la Italoj..., ilin ne imiti?...
De kio ja ilia superhoma
Geni' deveni povas? Nur de tio,
Ke ili iras sian propran vojon,
Ke ili ploras la dolorojn siajn
Kaj kantas siajn ĝojojn. Kial ili
Prezentas tiel belajn diojn? Tial,
Ke ili vidas ilin.... Kaj mi pensas:
Nu, kial ni ne farus same? Ili
Lazuron sian amas; amu ni
Nebulĉielon nian.... Nia suno

Ne tiom da radioj brilaj havas....
Ni tamen tiel, kiel ni ĝin vidas,
Ĝin pentru!... Ho, neebla tio ŝajnas
Al tiu, kiu sian patrolandon
Forlasis.... Sed ĝi estas facilega
Al tiu, kiu restas en la hejmo!

Jan levis la kapon; li aŭskultas. Kaatje iom ŝanceliĝas, sed tamen daŭrigas.

.... Sendube mi eraras.... Mi malbone
Parolas.... Estus, por spirito kaj
Okuloj miaj, festo vidi kaj
Admiri la titanbatalojn, la
Festenojn de la dioj, kaj el Romo
Fiere mi reirus hejmen tial,
Ke mi komprenas kaj altŝatas tion!
Sed mi ne same pentrus : mi prezentus
Aliajn aĵojn : oni ja kapablas
Animon sian tutan doni nur
Al tio, kion oni konas, kio
Kutima estas, kion oni havas
En sia hejm', proksime, kio tial
Eĉ estas parto de la propra vivo!
Amataj tiuj aĵoj ravus min;
Mi alridetus ilin, kaj iliajn
Aspektojn, formojn kaj kolorojn konus
Mi tiel bone, ke la verko mia
Ilia spegulbild' vivanta estus!
Ho, mi ne Jupiteron montrus, dum
Li rabas, ĉe l' tagiĝ', Eŭropon..., sed
En mian verkon mi enmetus tiom
Da zorg', da amo kaj da emocio,
Ke, ĝin vidante, la animoj tremus....
En la herbejon, inter la verdaĵoj

Kaj floroj, en pejzaĝon, kiu plaĉus
Al mi pro sia gracieco aŭ
Grandiozec', mi metus mian stablon;
Mi kun atento rigardadus la
Sekalajn kaj tritikajn kampojn, la
Salikojn grizajn kaj la verdajn ulmojn,
La brutojn, la kreskaĵojn, la ĉielon
Kaj ĉion, kion reflektadas mia
Okul', de kiam Dio ĝin malfermis....
Mi pentrus mian propran vivon meze
De tiu horizonto : mia verko
Esprimus la intiman emocion
De mia feliĉec' en mia hejmo....

Sin pli rekte al Jan turnante.

Mi revas, jes, al tiu, kiu volus
Sentigi la admirindecon de l'
Kamparo nia, kaj kun amo ĝin
Reflektus tiel, kiel li ĝin vidas
Per siaj flandraj, belaj kaj pensemaj
Okuloj! Se libere kaj sincere
Li pentrus la kutiman ĉirkaŭaĵon,
Se li prezentus sian verkon, fine,
Imagan ne, sed veran, sekve belan,
Ĉu kredas vi, ke tiuj, kiuj lin
Ĉirkaŭas, ne lin amos, ke li, kiu
La korojn tuŝis kaj altigis, restos
Nekomprenate sola? Ke neniu
Al li certigos : Mi konfidas vian
Laboron; jen, jen arto!

Ekscitiĝante kaj montrante al li la sunlumigatan kamparon.

Ho, rigardu,
Rigardu! Tiel bela, kiel ia

Legend- aŭ ia historipentraĵo,
Jen etendiĝas nia horizonto,
La vasta horizonto de Holando,
Kun sia malrapida riverego,
Kun siaj muelejaj krucobrakoj!
Rigardu la kanalon, kiu treme
Reflektas la ĉiaman vojiradon
De l' blankaj nuboj! Ho, kadraĵ' belega
De lia viv', kaj vi, patruja suno,
Konvinku lin, ke oni povas fari
Senmortajn verkojn, se nur oni restas
Fidela al la propra land', se oni
Ĝin amas, kaj se oni sur la tolo
Nur pentras ĝian lumon, la kutiman
Dolĉegan intimecon de l' patrujo,
La urbon, la riveron, la ĝardenon,
La hejmon de l' gepatroj, tiun ĉambron
Malnovan, tute plenan de parfumo
De ordo, de bonesto kaj de floroj....

De longtempe, Jan aŭskultas Kaatj'on kun pli kaj pli da atento. Li ekstaris emociate, kiam ŝi al li montris, daŭrige sidante ĉe la fenestro kaj superŝutate de la radioj de l' subiĝanta suno, la belan patrujan horizonton. Iom post iom, li ŝajnis pli tuŝata de ŝiaj paroloj, kaj nun, subite, li interrompas ŝin kaj daŭrigas, per tremanta voĉo :

JAN.

Kaj.... apud la fenestro, dolĉe, pace,
En milda lum' de tago subiĝanta,
Gracie sub la lina kufo, ŝi
Klinadas sin... ŝi, kies koro hela
Kaj simpla aperigas antaŭ mi
Tutnovan mondon de beleco kaj de
Entuziasmo.... Kaatje, diru, diru,
Ĉu estas vere? Jen, ĉu jen la vojo?

Kun pli kaj pli da emocio.

Sed vi al mi subite donis tiom
Da ĝojo.... Vi divenis mian koron
Pli bone, ol mi mem.... Pro kio, Kaatje?...
Ĉu vi do, eble.... iom amas min?

KAATJE, kiu ekstaris, tre emociite kaj tre simple.

Ho, ĉu mi amas vin!...

JAN, preskaŭ plorante.

Feliĉo, arto!

Feliĉo mia, arto mia! Ĉu
Mi fine vin retrovas? Bonulino,
Ho, bonulin'!...

Li proksimiĝas al Kaatje kaj, plorante pro ĝojo, metas sian frunton sur ŝian ŝultron. Kaj dum ŝi mane karesas liajn harojn, la patro, sekvate de la patrino, aperas sur la sojlo de la maldekstra pordo kaj mirante haltas.

KAATJE, sin iom turnante al la gepatroj, diras al ili, kun rideto de feliĉo :

Savita estas li!

TIEL FINIĜAS LA TEATRAĴO.

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Xięcia Michała Kleofasa Ogińskiego
N ..... Nr 14
w Białymstoku

1327-10. — Coulommiers. Imp. Paul BRODARD. — 11-10.

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku
000678400